



PACO



OFICIALA ORGANO DE MONDPACA ESPERANTIST MOVADO

VII-a jaro. N-o 80-81

Ĉeĥoslovaka eldono

Julio – Aŭgusto 1960

LA POPOLOJ DEVAS POSTULADI SENARMIGADON

La buroo de la Tutmonda packonsilataro decidis en la tagoj 9.—11. de julio adresi al ĉiuj popoloj de la mondo sekvantan **alvokon**:

„La popoloj de la mondo, vivantaj nun sub senĉesa minaco de la nuklea milito, ne povas akcepti malsukceson de internaciaj traktadoj.

La senarmigado estas necesa por savo de la homaro kaj por certigo de la paca kunvivado.

La popoloj devas postuladi ĝin, ili havas potencon akceptigi ĝin; freŝdataj sukcesoj de popolaj fortoj pruvas tion.

Ni postulas, ke kunvenu Tutmonda konferenco, alirebla por ĉiuj ŝtatoj, estu ili membroj de la Organizado de Unuigitaj Nacioj aŭ ne, por ke ni atingu ĝeneralan senarmigadon, kontroleblan en sinsekvantaj etapoj. Ni supozas, ke laŭ intereso de forigo de la plej senpera danĝero la unua etapo enhavus malpermeson de portiloj de atomaj armiloj kaj nuligon de militbazoj sur fremdaj teritorioj.

Ni postulas ĉiujn registarojn, ke ili jam de nun preparigu favorajn kondiĉojn por tia konferenco. Cele de tio estas necese eviti ĉiuspecan agadon, daŭrigantan malvarman militon, rezigni al provoj de atomarmiloj, respekti suverenecon kaj sendependecon de aliaj ŝtatoj.

Ni alvokas civitanojn de la tuta mondo, ke ili subtenu ĉi tian postulon.”

La alvoko estas akompanita per sekvanta **ĝenerala deklaro**:

„Nuntempe ni travivas la unuam momenton en la historio, kiam la premo de la homaro estas sentata en la tuta mondo samtempe.

La popoloj ekmarŝis. De Japanio kaj Koreujo ĝis Kubo ili jam atingis signifplenajn venkojn. Ne estas jam mondparto kaj estas nur malmultaj landoj, kiuj ĝis nun ne vekigis. En Afriko sinsekve naskiĝadas novaj memstaraj ŝtatoj, liberigitaj de la kolonialismo.

Sed ankoraŭ daŭras maltrankviligaj aferaĵoj. La lo-ĝantaro de la suda Koreujo, Japanio kaj Turkujo ĝis nun ne atingis liberigon de la militbazoj. Danĝera situacio evolus en sudorienta Azio, precipe en la suda Vietnamio kaj Laoso, same kiel en la okcidenta Irano. Kontraŭ Kubo estas validigitaj ekonomiaj sankcioj, kaj estas danĝero de ankoraŭ pli gravaj aranĝoj. Belgaj plifortigoj estis senditaj en Kongon, por klopodi pri pereigo de memstareco, antaŭ nelonge akirita. Obstineco de la franca registaro neniiĝis la unuan traktadon komencitan kun la provizora registaro de la Alĝeria respubliko. Rearmigado de la Germana federacia respubliko atingadas minacajn dimensiojn kaj ĝia armigado per nukleaj kaj direkteblaj armiloj despli multe akcentas danĝeron de la milito. Kaj fine — la konferenco en Genevo, kiu estis tiel multe esperiga, devis disiĝi senrezulte.

Sekve de ĉi tiaj okazintaĵoj la popoloj ĉiam pli komprenas, kiuj estas efektivaĵoj de la paco. Por malebligi iliajn intencojn, devas la tutmonda porpaca movado pli forte kaj iniciative ol kiam ajn antaŭe daŭrigi sian klopodon. En la intereso de la venko ĉiuj porpacaj fortoj de la mondo devas konservadi sian unuecon kaj efektivigi tre mallarĝan kunlaboron.

Jam multaj jaroj de post la komenco de nia movado batalis milionoj de homoj en la kvin mondpartoj

por la paco flanke de popoloj de socialismaj landoj kaj tiuj landoj, kiuj antaŭ nelonge akiris sian sendependecon. Ĉi tia batalado estas tre kruela. La pacdefendantoj en multaj landoj estas persekutitaj, iam ĝis la morto. Spite tion estas ĉie konstatebla signifplena kaj rapida kresko de porpacaj fortoj kaj plifortigo de iliaj agoj.

La lastaj okazintaĵoj en la suda Koreujo, Turkujo kaj Japanio estu por ni modelo! Ili pravigas esperojn des pli grandajn, ke ĉi tie ni vidis junularon en la unua vico! Ni povas konstati similajn aferaĵojn en Britujo, Francio. Italio kaj multaj ceteraj landoj. Kuraĝa batalo de Afrikaj popoloj por sendependeco vekas admiron de la tuta mondo. La popolo kaj la junularo ĉie starigas sin al flanko de la paco.

Merite de energia rezisto de ĉiuj tiuj fortoj kontraŭ la fortoj de la milito estas la vojo al paco malfermita.. Generala senarmigado kaj paca kunvivado tamen ne estas efektivebla, ĝis kiam ne estos plene certigita la rajto de la popoloj al sendependeco kaj plena respekto de ilia suvereneco en la sfero ekonomia same kiel en la sfero politika.

Tial la Buroo de la Tutmonda packonsilantaro alvokas popolojn de la tuta mondo, ke ili senprokraste disvolvigu agadon por atingi de sekvantaj celoj:

1. Kunvoko de la konferenco de ĉiuj ŝtatoj pri senarmigado.
2. Malpermeso de provoj de ĉiuj nukleaj armiloj.
3. Malpermeso de flugoj de flugiloj kun nukleaj armiloj sur ferdeko. Severa obeado al internaciaj juraj normoj rilate al aviadiloj flugantaj sen permeso super la fremda teritorio.
4. Likvido de ĉiuj militbazoj sur la fremda teritorio.
5. Avizo de ĉesigo de ĉiuj militkontraktoj.
6. Preparado de planoj, kiuj ebligis aliigon de la militekonomio al ekonomio paca.
7. Ĉesigo de rekta kaj malrekta intervenado en fremdaj landoj.

Unu el konstantaj taskoj de la porpaca movado estas subteno de ĉiuj popoloj, kiuj batalas por ilia nacia sendependeco, por defendo de ilia supereco kaj kontraŭ la rasismo. Ni postulas liberigon de ĉiuj malliberigitaj pacdefendantoj, rehonorigon de ĉiuj, kiuj estis persekutitaj, nome en plena amplekso de iliaj rajtoj, kaj garantion de libereco en ĉiuj landoj por tiuj, kiuj bataladas por la paco.

Estas neevitebla neesa konkreta agado, por plifortigi konsciiĝon de la popoloj, Ĉi tiuj popoloj devas fari premon al iliaj registaroj, ke ili rapide atingu realan interkonsenton pri senarmigado kaj paca kunvivado.

La vero kaj la justeco estas kun ni. Ni marŝas en potenca fluo de la homa progreso. Ni estas firme konvinkitaj, ke nia movado supervenkos ĉian malfacilaĵojn kaj ĉiajn barojn, kaj ke ni atingos perfektan venkon.

Buroo de la Tutmonda konsilantaro en Stockholmo, la 11-an de julio 1960.

Se oni dronigus la armilaron en la maron

Armilaro estas pli multekosta ol oro

La ĉiujaraj militelspezoj de ĉiuj registaroj de la mondo sumiĝas je pli ol 100.000.000.000 us. dol. (!)
- ne perceptebla cifero.

La usona registaro pagas al la militarmilaj monopoloj por unu kilogramo de la pezo de la bombaviadilo B-58 Hastler, aŭ de la raketa instalaĵo Atlas, aŭ de la submarinoj Nautilus, Seawolf kun atomaj moviloj pli da mono, ol kostas unu kilogramo da oro. Kaj bombaviadilo B-58 pezas pli ol 21.000 kg (!).

Ili revenus hejmen

Kiom da fortaj, sanaj junaj homoj estas deŝiritaj de siaj hejmanoj ? Kaj por kia celo ?

Jen la ciferoj nur pri 4 potencoj:

Lando	Loĝantaro	Armeo	En
		Militistaro	%-oj
Usono	174.000.000	2.611.000	1,50
Sovetunio	212.000.000	2.412.000	1,15
Francio	43.000.000	1.090.000	2,53
Anglio	50.000.000	648.000	1,29
Entute:	479.000.000	6.761.000	1,41

Kaj ne forgesu, ke unu militisto estas speciale priservata de 5 — 6 homoj, kiuj oficiale ne estas armeanoj.

Sekve nur en la supremenciitaj potencoj estas okupitaj proksimume 40.000.000 homoj.

Sed ĉi tiuj homoj povus trankvile vivi hejme, perlaborantaj por siaj familioj. Kaj al la homaro ne minacus la „venenaj fungoj" de la atomaj eksplodoj.

Malsatuloj mankus

Kio estas pli terura ol malsato ? Kaj malsatado estas por multaj realo.

Laŭ UNO en la mondo malsatas 1.200.000 homoj, precipe en landoj ekonomie ne evoluintaj: afrikaj, aziaj, sudamerikaj. Ili malsatas de la lulilo ĝis la tombo. En la okazo de duonigo aŭ de trionigo de la militbuĝetoj, monrimedoj ne mankus por forigi la malsaton en la ne evoluintaj landoj.

Milionoj ekhavas loĝejojn

Ankoraŭ milionoj da homoj en la mondo ne havas tegmenton super sia kapo. Ili revas pri neŝimigitaj muroj, pri konvenaj loĝejoj sen ratoj kaj cimoj.

Laŭ la usona revuo Labours economic review, 1959, eĉ en Usono — la plej riĉa lando de la mondo — ĉiu kvara familio havas siajn rifuĝejojn en malnovaj, ruiniĝantaj domoj.

Ankaŭ en Sovet-Unio kaj aliaj socialismaj landoj ne sufiĉas bonaj loĝejoj, malgraŭ la grandampleksa domkonstruado.

Per sumo egala al dekjara militelspezo tutmonda, oni povus konstrui 150.000.000 loĝejdomoj kun ĉia moderna komforto.

La tuta infanaro lernus

En la mondo ĉiu dua homo estas analfabeta. En aziaj, afrikaj landoj la nombro de legoscipovuloj estas nur 13 %.

Se NATO transdonus nur sian dekjaran militelspezon por la afero de la popola klerigado, oni povus konstrui 20.000.000 klasĉambrojn.

Povus malaperi „la poluso de malvarmo“

Grandajn terspacojn katenigas „la poluso de malvarmo“, kie la vintra temperaturo atingas 50— 70° C.

La soveta inĝeniero P. Borisov proponis la kuraĝegan projekton konstrui grandan digon en Beringamarkolo 74 kilometrojn longan kaj, pere de grandpovumaj pumpiloj, transpumpadi akvon el la Arkta maro en la Paci-fikon.

La Arkta maro plivarmiĝus, la klimato mildiĝus kaj milionoj da hektaroj da tereno povus esti uzotaj por grenkampoj, brutpaŝtejoj ktp.

La kosto de diu ĉi konstruaĵo egalas nur al la trimonataj (!) militelspezoj de la tri potencoj Usono, Sovet-unio kaj Kanado.

Ekflorus Saharo

Jam antaŭ delonge estis ellaborita la projekto krei digegojn kaj hidroelektrejojn en Gibraltar - kaj Dardanelmarkoloj (Mediterraneo).

La digegoj malaltigus la marnivelon kaj plilarĝigus la spacon de la plej fruktodona tereno, trioble pli larĝa ol tiu de Portugalio, Hispanio, Francio, Italio, Grekio kaj Turkio.

Tia gibraltara hidroelektrejo donus sufiĉan kvanton da elektro por provizi ĉiujn apudmediteraneajn landojn kaj transformi la dezerton Saharo en florantan ĝardenon.

Kial do ne estas efektivigata tiu ĉi grandioza projekto? Monmanko. Kial do mono sufiĉas por la eksplodoj de atombomboj en Saharo?

Nur kvin membroj de NATO-alianco, kiujn pli ol aliajn koncernas tiu ĉi projekto, nome Francio, Italio, Portugalio, Grekio kaj Turkio elspezis dum la du lastaj jaroj por sinarmigo sumon sufiĉan por povi realigi la projekton.

Sed anstataŭ transformi Saharon en oazon, la franca registaro preferas transformi ĝin en atombombeksplodejon.

Inĝ. **Aleksej I. Verŝinin**, USSR, Odessa.



MALNOVA MILITISTA KANZONO

Kiam nova usona militŝipo antaŭ nelonge estis transdonata al Germana Federacia Respubliko, kontraŭmiralo Mc Manes deklaris, ke la nova destrojero „sub germana flago daŭrigos la fierajn tradiciojn de la usonaj militŝipanoj en sia tasko en la Balta Maro“.

La malnova kanzono.

La okcidentgermana militŝiparo montras jam nun 160 unuojn. La nombro de submarŝipoj konsiderinde plialtiĝis. Oni jam ellaboris planojn por konstruado de „destrojeroj“ kun akvodismeto ĝis 5000 toneloj. La novaj militŝipoj estos armitaj per atombombportantaj robotoj.

Laŭ la pariza interkonsento de 1954 Okcidentgermanio ne rajtas konstrui grandajn militŝipojn. Sed oni jam komencis elastigi la malpermeson.

Koncerne kernarmilojn, oni en Pentagono kaj Bonn ŝajne opinias, ke tiu demando estas solvita, ĉar la okcidentgermana armeo estas ekipataj per ili.

La propono de Sovetunio kaj aliaj bordposedantoj ĉe la Balta Maro, ke tiu ĉi maro fariĝu paca maro, estas varme aprobita de milionoj da homoj en la balta-mar-landoj. Sed troviĝas en Okcidento militistoj, kiuj volas fari la Baltan Maron milita maro.

F. Müller, GFR.

AFERO DE RACIO KAJ BONA MORO

Dum miaj infanaj jaroj ĉiŭ eta paŝtisto sciis, ke li ne rajtas permesi al liaj kaprinoj iradi en trifoliejon de najbaro. Mi memortenas, ke mi foje malobeis ĉi tian bonan kutimon pro intenco, satigi miajn zorgatojn dum la plej mallonga tempo, kaj la najbaro interkonatiĝis sian bastonon kun mia dorso. Krom tio, li plendis ĉe mia patro pri mia krimo. Estante ambaŭ prudentaj homoj, ili facile interkonsentis pri ceteraj aranĝoj. Mia patro ĉetis du glasojn da biero, kiujn ili konkorde malplenigis honore al pluaj bonaj interrilatoj. Ceteraj aranĝoj konsistis el malagrabla severa instruado de mia persono pri limoj de niaj kvarareaj bienkampoj, kaj la patro intersigis la instruadon, aplikante rimemon. Tio efike influis mian rememoron kaj *depost la tempo* mi gardis la kvarmembran brutaron al mi komisiitan tre zorgeme ĝis la tagoj, kiam rikoltsezono estis finita kaj laŭ antikva kutimo brutaro povis libere sin paŝti senkonsidere kamplimojn.

Mi jam ne scias, ĉu ĉi tia, ĉu ia alia el miaj bubaj spertoj, ekzemple okaze invado de kokinoj en najbaran korton cele parazitado je fremda grenero, aŭ okaze de nia invado en fremdan ĝardenon celi esplore kvaliton de pomoj apartenintaj al nia proksimulo — simple ia el ĉi tiaj spertoj aŭ ili *ĉiuj* entute, inkluzive akcesoraj sekvoj, fiksas en mia rememoro ekkonon, ke neniu estu atakanta teritorion de la alia. Samtempe ekestis en mia penso imago, kiel belege estuson la monda, se ne ekzistus limoj kaj baroj inter landoj kaj homoj koroj — sed, tio estus alia ĉapitro.

Eble estas siaspece nesufiĉe digna, intermiksi infanajn spertojn kun gravegaj okazintaĵoj, sed estu tio permesata al la homo, kiu ne ŝatas maljuniĝi ĝisvivante la tempon, kiam — spite ĉiajn malserenajn subterajn potencojn — ĉiu printempe pli ĉarme gloriĝas nia maljuna tero, plibeligita per laboro de siaj gefiloj, transdorigita per kanto de iliaj infanoj. Cetera, mi skribis ĉi tiajn alineojn dum la festo de nunjara Internacia tago de infanoj, post kiam mi revenis el la lernejo, elaŭskultinte tie oponion de etaj bravaj pioniroj pri paco kaj milito. Do, venis al mi la ideo, ke tiuj kompetentuloj, kiuj kaŭzis nenigon de la ŝtatestra konferenco per elsendo de la USA — aviadilo supren al la USSR — teriotori, kie ĝi trovis konate malfaman finon, versimile neniam estis homece instruitaj pri la neceso obei ŝtatajn limojn. Certe, ili komprenas tion, kiam temas pri la limoj de iliaj ŝtatoj, kaj estus mirinda, se oni supozus humilan rideton de la najbaro, kies rikolton la alia danĝerigas. Sed, eĉ post la faro ili alie agus, havante bonan volon, ĉar estas nekredebla ilia nescio pri ebleco rebonigi maljustaĵon kaŭzitan per malbonmoraj hejmanoj, per racia interkonsento kaj konvenaj aranĝoj.

Por ni ĉiuj, kiuj atendis la konferencon de la kvar registarcĉefoj kun grandaj esperoj, ke ĉiokaze estos interkonsentitaj premisoj por plua trankvila, bonstatkrea laboro, forte ĉagreniga estas ĝia malebligo. Ni kredis, ke ĉiokaze renkontos siu reprezentantoj de popoloj, kaj fare de altranga saĝeco, enhavanta reciprokan konsideron, starigos bazon por paca kunekzistado de malsamaj mondkonceptoj. Precize dirite, kvankam la alsendo de la aviadilo, speciale ekipita por spionaj taskoj, super la fremdan ŝtaton, ne estas afero subrespondeca, estis ebla solvi la aferon per raciaj aranĝoj flanke de la prezidento de USA, t.e. per ekskuzo al USSR, puno de kulpintoj kaj certigo pro ĉesigo de similaj malkon-venaĵoj. Ne estas eble imigi, ke okaze de situacio inversa, t. e., se temus pri soveta aviadilo super USA, la USA-registaro kontentiĝus kun pli simplaj aranĝoj.

Povus ja okazi en aviadista agado, ke aviadilo senintence troviĝos super fremda ŝtato, kvankam kutime ne temas pri aviadilo simile akipita kiel la tiurilata, ĉikaze ekzistas bona kutimo, ke la posedanto de la aviadilo kontentige klarigos la aferon kaj senkulpigos sin. Tio ja estas simpla bonkonduco — supozo por amikaj interrilatoj. La ĉagreniĝo de ĉiuj pacemaj homoj, kaŭzita per la sintenado de la USA-registaro, kies eminenta reprezentanto rifuzis similan bonkonducan faron rilate al la USSR, estas memkomprenebla. Kontraŭe, ĉiu komprenas, ke N. S. Ĥruŝĉov en tiaj cirkonstancoj ne povis ekstrakti kun bezona konfido kaj sen malpliigo de prestiĝo de sia lando, kiu senĉese montras al la mondo sian supercon en teknikaj eĉ aliaj fakoj, eĉ en sia ne-venkebla defenda forto. La ĉagreno de la pacema homaro *rilate* al la registaro de USA estas ju pli granda, des pli malmulte ĝi montras pretecon solvi diferencajn problemojn ideologiajn alimaniere, ol el bazo de

militforteco.

Feliĉe, nia kredo je konservado de la paco ne estas malaperinta. Pasis ja epoko, kiam registaroj estis ĉiopovaj. La popoloj en ĉiuj landoj ĉiam pli firme prenas aferon de la paco en siajn manojn. En la epoko, kiam la homaro malfermas kosmajn spacojn, ĝi ne povas resti dividita inter ekspluatantoj kaj ekspluatatoj, sed estas bezona ĉiam pli intima kunlaboro kaj nepre estas forigenda ĉio, kio malhelpas tion.

La teknika progreso liberigas laboron de penado, kaj krom labortempo ĉiu havos ĉiam pli multe da tempo por kulturo, amuzo kaj personaj agrablajoj. Socialismaj ŝtatoj demonstraciados metodojn, laŭ kiuj estas efektivebla la devizo: Por ĉiu sufiĉe da pano eĉ da rozoj! Se kiu ajn el la kontraŭa tendaro scias pli efikajn metodojn, kiel akiri la saman celon pli perfekte kaj pli baldaŭ, nenio malhelpas, ke li uzu ilin en la paca konkurado. La kapitalisma sistemo disponis ĝis nun pri multaj jaroj de sia ekzistado kaj havis sekve de tio sufiĉe da eblecoj por ke ĝi demonstru siajn avantaĝojn. Prezertinte al la mondo apud riĉegeco de kelkaj unuopuloj mizerecon de amasoj, senlaborecon, konfliktojn kaj militojn, ne estas rajtigita riproĉi al kiu ajn, se li preferas la sistemon, pruvintan dum tempoj de famaj kvinjaroj planoj. Ekonomiaj sukcesoj, daŭre kreskanta vivnivelo, ĝojiga laboro kaj kulturplena vivo en paco — tio ja estas la plej efikaj argumentoj, por kiuj la pacema homaro arde subtenas la sintenadon de USSR kaj porpacajn proponojn de la soveta registaro.

Finfine, milito jam ne estas rimedo, kiu la malnovan mondkoncepton efike rejunigus; pli multe ĝi similus al rimedoj, kiuj kaŭzas lastan ekflamiĝon antaŭ la morto, despli frua. Uzo de similaj rimedoj estas nur afero de gusto; saĝaj kaj bongustaj homoj kutime preferas finvivi sen amasigo de malbenoj sur propran tombon.

Josef Ed. Ambrož

KIAL LA MORTIGISTOJ DE ANNE FRANK RESTAS NEPUNITAJ

Tre noblan kaj utilan aferon faris nia eminenta samideano Teo Jung per la eldono de la libro „La taglibro de Anne Frank“. La libro estis bone akceptata en la medio de nia samideanaro. En ĉiuj esperantaj gazetoj aperis favoraj recenzoj. Kaj multaj legantoj de tiu ĉi libro verŝis larmojn pro la malfeliĉa sorto de la hebrea knabino.

La knabino kun sia familio estis mortigita en gasĉambro de la germanfaŝista koncentrejo Bergen-Belzen en aprilo 1945.

Trovita post la mondmilito la taglibro de Anne Frank, en kiu la knabino kun infana rekteco rakontas la historion de sia vivo en Amsterdam, okupita de germanaj naziistoj, estas akre akuzanta dokumento kontraŭ la teruregoj de la hitleranoj.

Kaj alvenas penso: Anne Frank estis ĝismorte turmentita, sed ĉu estis punitaj la faŝistaj banditoj-mortigistoj? Kie estas ili?

Ni povas respondi al tiuj demandoj:

La murdistoj restas vivaj, liberaj kaj ĝuas bonan vivon en okcidenta Germanio, kie ili okupas bonajn postejn, eĉ deputitajn.

Kiuj estas ili?

1. **Konrad Hemmerker** — SS-Oberscharführer, eksestro de koncentracia tendaro en Westerbrock, Laŭ lia ordono Anne Frank estis sendata en la gasĉambro. Nun li trankvile loĝas en Düsseldorf, Parkstrasse 55. Daŭre ne punita.

2. **Willy Lages** — eksestro de Sekurecadministrejo naziista en Amsterdam.

Post la milito lin arestis la nederlanda polico kiel krimulon. La nederlanda juĝejo juĝis lin al

mortpuno. Sed post kelkjara mallibero li estis la 25-an de aprilo 1950 liberigita laŭ skriba peto de — Konrad Adenauer (jes-jes, vi ne eraris, de la Okcidentgermana kanceliero). Kaj nun la mortigisto ĝuas la vivon en Bonn. Sed Anne Frank ne vivas plu.

3. **German Konring** — speciala rajtigito de Reichskomissar en Nederlando, persone gvidinta amasajn pelĉasojn je hebreoj, komunistoj kaj socialistoj.

Nun tiu pogromisto estas elstara persono en Okcidentgermanio: deputito de la kristanademokratia partio en Bundestag (parlamento).

Ĉu nun estas mirige, ke tra la tuta Okcidentgermanio traruliĝis la abomena ondo de kontraŭhebreaj demonstracioj, ke estas juĝataj pacdefendantoj — ĉar tiaj „kristanoj“ okupas la gvidpostenojn tie?

Tiaj estas la faktoj!

Se s-ro Konrad Adenauer efektive klopodas trovi (kiel li onin certigas) la iniciantojn de la nunaj kontraŭhebreaj demonstracioj en okcidenta Germanio, la desegnantojn de la naziista svastiko sur la dommuroj en okcidentgermanaj urboj, tiuj ĉi faktoj helpus lin.

Niaflanke ni nur povas diri: Homoj, pri paco oni ne babilu, por paco necesas batali, ĉar la mortigistoj de Anne Frank, ĉu rektaj aŭ nerektaj, ankoraŭ estas en libero kaj serĉas por si novajn viktimojn.

La sango de Anne Frank vokas al atentemo.

Dipl. inĝ. **Aleksej I. Verŝinin**, Odessa, USSR.

PROTESTO KAJ APLAŬDO

Laŭ la grado de nia adaptiĝo al la Interna Ideo de nia movado ni esperantistoj estas ankaŭ praktikantaj pacamikoj. Tial ĉia faro kontraŭ la paco, ja ankaŭ politika, tuŝas nin ofende kaj provokas nian reagon.

Pro tio ne povas esti alie, ol ke ni esperantistoj, sufiĉe riskemaj por aparteni ankaŭ al la Mondpaca Esperantista Movado, estas incititaj per la timiga fakto, ke okcidentgermana tribunalo, nome la supera en Düsseldorf per speciala (!!!) fako - kiel iam sub la Tria Regno — prilaboras prokuroran akuzon kontraŭ honorindaj civitanoj nur tial, ke ili varbadis kun trafaj argumentoj, kiujn ĉiu honesta homo konsentas kaj aprobas, por la konservado de la paco grave minacata de la nova periodo de ekipado per armiloj, kiaj jam malfeliĉigis la japanan popolon; ke ili avertis kontraŭ la intrigoj de la profitavidaj privataj armilfabrikistoj kaj gloravidaj ĉiamaj marŝemuloj kaj atentigas pri la iamaj promesoj kaj kontraŭmilitaj juroj de la nuntempaj registaroj en sia patrujo - ne plu regantoj, ĉar politiko fariĝis profesio - ke neniam plu ili tuŝos aŭ tuŝigos armilojn post la katastrofo de 1945, pri kiu kulpiĝis samaj gravuloj, kiuj nun kunpreparas novan katastrofon, servuteme kaj molspine sin disponigantaj al eksterlanda potenco, kun ĝi erare opiniante, ke kredon aŭ konvinkon oni povas malefikigi perforte.

Same anime skuita estas la tutmonda membraro de MEM de la bruteca traktado de la negraj praloĝantoj riĉigintaj la enmigrintan blankularon en Sudafriko pere de malprudentiĝintaj registaro kaj manaĝistaro de la tiea ekonomio kaj esprimas sian sinceran indigniĝon kaj profundan simpatiecon al la senkulpaj, per sia konduto la blankan rason hontigantaj indiĝenoj. Ankaŭ ĉi tio estas tre danĝera dubindigo de la paco surtera.

Ĉion ĉi pripensinte ni esperantistoj, organizitaj en MEM, protestas kontraŭ tiuj sensaciaj atakoj kontraŭ la paca tutmonda, kondamnas la repreparadon de nova eksterma mondmilito kaj la civile malkuraĝajn kunhelpantojn de la krimulaj instigantoj, bedaŭras la sorton de la germana nacio kaj nigrularo submetitaj al tia dependa juĝado ne sufiĉe ĝenata de moralaj motivoj kaj esprimas al la geakuzitoj antaŭ la specialtribunalo Düsseldorf kiel al ĉiuj persekutataj pacamikoj kaj rasanoj siajn

profundan simpatian, admiradon kaj dankon por ilia rektanima konduto, indiferentaj pri la rezulto de tiu proceso impresanta kiel pagita ludo de marionetoj, kaj pri la eĥo de ĉi tiu protesto kaj simpatiesprimo.

La esperantista gazetaro estas petata, represi ĉi tiun manifestadon de forte ĉagrenita legantaro.

Proponinto: Por D-ro Halbedl pm. MONDPACA Sekretario;

ESPERANTISTA MOVADO A. Balague pm.

Prezidanto: K. Kvist pm.

La Indonezia prezidanto por libereco, amikeco kaj paco



Prezidanto d-ro Sukarno okaze la vizito en Brno (Ĉeĥoslovakio) 1958.

Tra multaj landoj de Eŭropo vojaĝis d-ro. S u k a r n o, la ŝtatsprezidanto de Indonezio. Inter tiuj lin akceptis kun granda amikeco feste ornamita ĉefurbo de Hungarlando, Budapest. Krom la registaraj kaj oficialaj vizitoj, pritraktadoj kaj festoj li havis okazon viziti ankaŭ uzinojn kaj grandan kunsidon de hungaraj laborantoj.

La oficiala deklaro, kiun subskribis d-ro Sukarno kaj Istvan Dobi, prezidanto de la prezida konsilantaro de la Hungara Popolrespubliko, konstatas la interkonsenton en multaj gravaj aferoj. Inter ili pri la ĉesigo de la militcelaj atomeksperimentoj, pri la malarmado, pri la akcelota interkonsento ĉe la plej superaj konferencoj de la ŝtatestroj, pri la neceso de la kunvivo kaj amika kunlaboro eĉ de diversaj politikaj kaj sociaj sistemoj. Oni deklaris la apogon de la luktado de la afrikaj popoloj por sia nacia sendependeco kaj oni kondamnis la rasan distingadon en Sudafriko,

Oni decidis amikan kunlaboron ekonomian kaj plivastigantan kulturinterrilaton en intereso de ambaŭ ŝtatoj kaj ankaŭ por la mondpaco.

Ĉe la publika popolkunveno en la granda sporthalo de Budapest d-ro Sukarno deklaris, ke „**nia luktado estas komuna kaj ĝi finiĝos nur tiam, kiam ĉie en la mondo regos paco, kiam ĉie floros la vivo kaj ĉie regos la frateco de la homoj!**“

Li konigis la multcentjarajn luktadojn de la indonezia popolo por la libereco kaj sendependeco, pri la ripetaj subpremoj kaj pri la renaskiĝo.

Indonezio konsistas el multegaj insuloj. Ĝi estas grandega insullando, havanta tri mil loĝatajn kaj sep mil neloĝatajn insulojn. La interno de niaj grundoj enhavas oleon, plumbon, karbon, nikelon, feron. La grundo de Indonezio estas tre fekunda."

Ĝuste tiu riĉeco allogis la koloniigantojn. Sinsekve venis hispanoj, portugaloj, nederlandanoj por ekspluati la landon.

Ni fariĝis popolo de kulioj kaj la kulio de la nacioj.

Tiutempe ankoraŭ ne estis unueco inter la insulanoj. Sed poste ili ekkonis, ke por esti libera necesas

unueco. La 17-an de aŭgusto 1945 oni venkis la okupantojn kaj elmetis la ruĝblankan flagon de Indonezio. En nia ŝtata blazono estas la devizo: „**Unueco en la diverseco.**” Sed la saman devizon oni devas realigi inter la nacioj de la tero „ke ĉiuj nacioj de la mondo unuiĝu en unusola homa, frata komuneco!”

Poste li deklaris, ke la indonezoj sentas sin fortaj, ĉar ili fidis sian estontecon, ke ili atingos sian celon kaj tio donas forton, ĉar ili estas unuecaj kaj „ĉar ni scias, ke ĉie en la mondo ni havas amikojn!” Ili luktas por la samaj celoj kaj helpas al ili!

„Ni organizis la konferencon de Bandung, kiun partoprenis reprezentantoj de dudeknaŭ aziaj kaj afrikaj landoj en nomo de unu miliardo kaj ses cent milionoj loĝantoj. Depost tio pluraj afrikaj popoloj fariĝis liberaj. Nun jam ni povas paroli pri unu miliardo kaj ok milionoj da homoj.“ Kaj ilin helpas la potenca forto de la socialistaj landoj, sed ankaŭ la laboristoj kaj progresemaj, pacvolantaj homoj de Okcident-Eŭropo, de Ameriko. Sume du kaj duono da miliardoj!

Li ricevis leterojn, simpatideklarojn de laboristoj el Usono, el Kanado, el Meksiko, de brazilanoj, el Argentino, Venezuelo, el eŭropaj landoj, el ĉiuj partoj de la mondo.

„Nun, kiam mi faras mian vojon tra la mondo, mi ekkonis la liberecamon de la popoloj kaj mi povas aldoni, tiu ĉi liberecedeziro estas ne nur ĉionpova, sed ankaŭ ĉie ĉeestas: en mia koro, en via koro, en la koro de ĉiu homo.“

„Mi tial iras tra la mondo, ke mi parolu pri kaj por la libereco, ke mi petu amikecon kaj postulu pacon por la tuta mondo. Eĉ pli — ni postulas ne nur la mondpacon, sed ankaŭ la fratecon de la homoj! Por tio ni luktas, por tio ni laboras!” Ĉu ne la saman vojon iras la vera, pacvolanta esperantistaro?

(Raporto de Pal Balkanyi, Budapest.)

Jiri W o l k e r :

Balado pri okuloj de hejtisto

Silentas la fabrikoj, silentas la bulvaroj, ekdormis sur ĉielo la steloj sub lungardo kaj en la tuta urb’ en tiu temp’ tardhora ne fermis la okulojn nur unu domo sola, ĝiaj okuloj krias tra nokt’ per fajraj langoj, ke tie inter maŝinoj, kaldronoj kaj feraj stangoj dek laboristoj siajn muskolojn plektis kun fero, por ke l’ okuloj kaj manoj fariĝu lumhelo.

„Antonio, hejtisto elektreja, karbon’ sub la kaldronon!”

Antonio, kiel antaŭ jaroj dudek kvin malfermas la fornon per fera ŝovelilo, ruĝegaj siblaj flamoj eksteren premas sin, fraŭlo kaj fornego, en fajrobrilo.

Antonio per manoj jam raspaj de ardo

almetas plenan ŝovelon da karbo;

kaj ĉar la lumoj nur el hom’ naskiĝi pretas

li post ĉiu ŝovelo pecon de l’ okuloj jetas

kaj tiuj okuloj klaraj, kun bluo cikoria,

tra faskoj de dratoj super la urbo cirkulas,

en kafejoj, teatroj, plej ŝate super rond’ familia,

en ĝojplenaj lumoj ekbrulas.

„Kamaradoj, elektrej-laboristoj, tre stranga estas mia edzin’, se mi en okulojn rigardas ŝin, ŝi ploras kaj diras, ke damno min trafis, ke mi ne havas okulojn, kiajn mi foje havis.

Kiam mi — ŝi diras — la geedziĝon festis, ili estis grandaj kiel du panoj, kaj sciis bele brili, sed nun, kvazaŭ en plad' malplena en vizaĝ' al mi restis du etaj paneroj el ili.“

Ridas la kamaradoj, kun ili Antonio kaj meze de nokt' kun elektrostelaj radioj ili pri la edzinoj por moment' pensetas, kiuj naive tiel ofte kredas, ke vir' naskiĝis por aparteni al ili.

Kaj Antonio, kiel antaŭ jaroj dudek kvin malfermas la fornon nur per pli peza fero.

Ne kompreneblas ĉiam la virin', ŝi ankaŭ pravas, tamen laŭ alia vero.

Antonio la floron de l' okuloj kun karbo hejtigas verŝajne sence, sed dev' lin instigas.

La vir' ja ĉiam emas super la ter' promeni per larĝapertaj okuloj kaj inter ili ĝin teni kaj kiel Sun' kaj Luno veturi tra l' Terporoj ambaŭflanke por lumo en am' kaj de l' rikoltoj.

Tiam Antonio, hejtist' kun kala manplat', ekonis la dudek kvin jarojn ĉe l' forn' kaj ŝovelad',

dum kiuj la okulojn tranĉis flama tranĉil', kaj trovinte sufiĉa por viro mortpasi kiel vir', li ege ekkriis tra l' nokto kaj tra l' mondobru': „Kamaradoj, elektrej laboristoj, mi estas blinda, mi ne vidas plu!“

Alkuris la kunuloj,

kiujn la tim' ekjugis

tra duobla nokto

lin hejmen kondukis.

Sur sojl' de unu nokto

edzin' kun ido ĝemas,

sur sojl' de dua nokto

ĉielo sin malfermas.

Ho Antonio,

ho edzo, ho trezoro,

kiele vi revenas

al mi en nuna horo?

Kial amoris vi

kun damna fojojn mil,

kun fera amatin'

fajro kaj ŝovelil'?

Kial du amojn viro

en kor' kutimas porti,

l' unuan li mortigas,

pro l' dua devas morti?

Ne aŭdas la blindulo — obskuren li trafalas,

obskuro lin brakumas, obskuro lin vualas,

la koro vundita forlasas bruston Iian

serĉi en mond' al si bandaĝon alian,

sed super la blind-nigro gaja lampo ardas,
ne estas gaja lampo — ies okuloj rigardas,
estas okuloj viaj al tuta mond' donitaj,
por ĉiam klare vidi kaj resti mortospitaj,
estas vi, hejtisto, trans lacajn korposplitojn kreskinta,
kiu vin mem rigardas, kvankam vi kuŝas blinda.
La laborist' mortemas, la labor' vivantas,
Antonio mortas la ampolo kantas:
Edzino — edzino mia, ne ploru!

Tradukis konsulte kun Tomáš Pumpr Jiří Kořínek

La ĉeĥa popolo rememoras nunjare la 60-an naskiĝjubileon de sia tre glorigata poeto, Jiří (Georgo) Wolker. Lau propra surskribo sur poeta tombe li amis la mondon, kaj iris batali por justeco en ĝi, mortis dudekkvarjara, „antaŭ ol li povis al batalo koron eltiri.”

Wolker akiris amon de laborista klaso per homeca rilato al socialaj problemoj. En siaj, propramaniere konstruitaj poemoj, li prezentis pezan vivon de homoj suferantaj, malesperaj kaj humiligitaj, vidante en ilia aro veran, eĉ ofte kaŝitan heroecon. En komunismaj ideoj li trovis firman bazon kontraŭ la malkvieto de sia tempo.

Nekrologo

„Ĝoje anoncas mi al vi, ke la ‚Lathatatlan ember‘ (‚Nevidebla homo‘) videbliĝis en esperanto, en unu ekzemplero. La 15-an de tiu ĉi monato mi finis la tradukon. La tekston de la kantoj, troveblaj en la romano tradukos d-ro Szilagyí Ferenc...” Tiel ĉi skribis la hungaro Kormos Jenó al mi la 23-an de septembro 1959.

Antaŭ ne longe mi ricevis la informon, ke k-do Kormos Jenó mortis pro longdaŭra kormalsano, la 7-an de novembro 1959. Li esperantiĝis en la jaro 1927. Dum jardekoj li sindone kaj fervore laboris por esperanto.

Lia lasta traduko estas la supre menciita historia- romano de Gardonyi Geza. Ĝi temas pri la vivo de la hunoj kaj ilia fama gvidanto Attila.

Liaj aliaj tradukoj en esperanto estas: „La vendistino“ de Orbok Attila; Sasanjo, la kantema; kaj „Sub tero, super tero“, porjunulara romano el la mondo de mineraloj. Ambaŭ de Ferenczi László Marcella.

K-do Kormos Jenó naskiĝis la 23-an de junio, 1904, en la urbo Torda.

D-ro BEIER Sandor, Cluj, Rumanio.

Foiro en Brno — simbolo de paca kunlaboro



Okaze la 1-a Internacia foiro en Brno pasintjare pli ol du milionoj da vizitantoj preskaŭ el la tuta mondo — inter kiuj geesperantistoj ne mankis — konvinkiĝis, ke la strebado de la ĉeĥoslovaka popolo pri paca internacia kunlaboro havas realan bazon. Same konvinkiĝis, ke ĉiuj landoj, kies entreprenistoj (entute 447) montris rezultojn de ilia laboro, ege prosperadas en paca krea laboro. Ne malpli gravas, ke la vizitantoj persone spertis altan vivnivelon de la ĉs. popolo kaj tendencojn pri plua ĝia plialtigado eĉ forigado de mankoj ankoraŭ ekzistantaj.

Nunjara internacia foiro en Brno, kiu okazos en la tagoj 11 - 25-an de septembro, en la kadro de unuopaj ekspozicioj akcentos kiel ĉefajn politikajn konceptojn kaj ekonomiajn kaj kulturajn motivojn, **la pacan kunlaboron kaj ekonomian konkuradon, helpon al malpli progresitaj landoj, ĝeneralan plialtingon de vivnivelo.** La maŝinfabrika karaktero de la foiro akcentastendenconforigi penigan laboron, kaj samtempe plialtigi kaj malkarigi fabrikadon de porvivaj bezonaĵoj. Ekz. modernaj terkulturistaj maŝinoj favore influadas pli grandan produktadon de nutraĵoj, potencaj trafikiloj plifaciligadas trafikon inter fabrikoj kaj homoj kaj proksimigas unuopajn regionojn kaj ĝian loĝantaron.

La 2-an foiron partoprenos mondfamaj firmoj, kaj iliaj fabrikoj estos lokigitaj en fakaj grupoj; ĉi tiaj aranĝo ebligas al vizitantoj perfektan supervidon kaj kompareblecon. Kelkaj okcidentaj ŝtatoj estos nunjare reprezentataj per oficialaj informaj kancelarioj, kiuj estos lokigitaj en nova moderna konstruaĵo kun la tasko, perfekte informi interesulojn pri fabrikado, komerco kaj vivo en iliaj ŝtatoj. Senpera kontakto donos la plej bonan eblecon konvinkiĝi pri stato kaj laboro en unuopaj ŝtatoj por profito de la homaro.

Kvankam la foirejo estas nunjare pliriĉigita per kelkaj novaj ekspoziciejoj, la moderna pavilono „Z“ konservos sian esceptan vidindecon, estante disponebla ne nur por celoj foiraj, sed ankaŭ aliaj, precipe sportaj. Cetere, eble ĝi ricevos sian ĝemelon en Gotterborg (Svedujo).

PER TAKSADO DE „MERITOJ“ ONI TAKSAS SIN MEM . . .

D-ro Theodor Oberlander, kiu deĵoris sep jarojn en la okcidentgermana ministrejo „por forpelitoj, trans-fuĝintoj kaj militinvalidoj“ nun forlasis sian oficon kun dumvita pensio je 36.000 germ. markoj.

Kiel malnova naziisto li partoprenis en la eksterm-politiko kontraŭ la pola loĝantaro. Kaj kiel kapitano en la hitlera armeo li organizis specialan spionad- kaj sabotadgrupon kontraŭ Sovetunio

dum la milito. Lia nuna celo estas, kiel li mem diris, „reakiri la germanajn orientprovincojn“.

Per la granda pensio al li, la okcidentgermana regis-taro volas doni pruvon, ke ĝi alte taksas la agojn de Oberlander, Sed samtempe ĝi kondamnas sin mem an-taŭ ĉiuj pacdefendantoj.

Labkoro, GFR.

UNESKO honorigas la nomon de d-ro Zamenhof

La Deka Sesio de la Generala Konferenco de UNESKO invitis ĉiujn Ŝtat-Membrojn „celebradi la datrevenojn de grandaj personecoj“, inter kiuj ĝi proponis kaj *unu-nime* elektis D-ron Zamenhof.

Bestoprotekta societo en Danio protestis kontraŭ elsendado de bovobatala programo en televizio. Oni aprobis la proteston kaj elsendis anstataŭe militfilmom . . .

Niĉjo.

Pola Radio eldonis du bele presitajn prospektojn en Esperanto pri ĝiaj disaŭdigoj kaj laboro. Mendeblij ĉe: Pola Radio, Esperanto-disaŭdigoj, Varsovio, Pollando.

Necesa respondo al Germana Esperanto-Revuo

Germana Esperanto-Asocio (GEA) eldonas oficialan organon. Tion rajtas ĉiu Esperanto-Asocio. Ankaŭ ne estas eviteble, ke tia organo respegulu naciajn trajtojn. Entute tiu Germana Esperanto-Revuo servas al la Esperanto-movado. Ĝi havas artikolojn pri lingvaj demandoj. Ĝi proponas por certaj germanaj esprimoj la plej taŭgajn Esperanto-vortojn. Ĝi anoncas kongresojn, renkontojn kaj kunvenojn. Ĝi publikas artikolojn pri meritaj geamideanoj. Ĉio tio estas akceptinda.

Bedaŭrinde en la Germana Demokrata Respubliko ankoraŭ ne ekzistas organo por la esperantistoj. Nun GEA donace sendas al konataj gesamideanoj en GDR la Esperanto-Revuon. Tio estus ĝojiga, se tiu ĉi revuo ne en lasta tempo enhavus artikolojn, kiujn ni en GDR ne povas agnoski, ĉar ili entenas tendencojn, kiuj ofende direktas sin kontraŭ nia socia sistemo kaj registaro. Jam en n-ro 3 de la Germana Esperanto-Revuo oni rekomendas Esperanto-broŝurojn de la Federacia Respubliko, kiuj klopodas pruvi, ke la mondo kontraŭ Germanio agis maljuste. Kaj en n-ro 3 iu samideano Kempe kritikis broŝuron eldonitan de Pola eldonejo (Polaj Okcidentaj kaj Nordaj Teritorioj). La samideano bedaŭras, ke Esperanto estas „misuzata“ por tia broŝuro kaj prezentas sin kiel „forpelita sileziano“. Li mallaŭ-das la eldonintojn de la broŝuro, ĉar ili laŭ lia opinio falsigis la historion de la lando. Laŭ li la lando estis laŭ la historio germana. Sed li, kiu nomas la broŝuron „pamfleto“, asertas: „Ĉe tiu liberiga agado malaperis preskaŭ du milionoj da germanaj homoj. Ĉu ili sin mem mortigis?“

Jen estas la argumento, kiu nepre estu korektota. Certe samideano Kempe kaj ankaŭ la redaktoroj de Germana Esperanto-Revuo scias, ke jam dum la lastaj militaj monatoj (januaro — marto 1945) milionoj da germanaj homoj estis forpelitaj de germanaj policaj trupoj el siaj vilaĝoj kaj urboj. Ilia marŝadp okcidenten estis neimagebla suferado. En mia hejma urbo Dresden troviĝis en februaro 1945 kelkaj centmiloj da fuĝintoj. Dekmiloj da ili estis trafitaj de britaj bomboj dum la bombatakoj en Dresden (13an kaj 14an de februa-ro). Mi scias, ke la pro frosto mortintaj infanoj dum la veturado en la vagonaroj estis elĵetitaj el la vagonaroj. Korektaj ciferoj pri la viktimoj de la postuloj de la germanaj policaj trupoj ne estas haveblaj, sed nun kulpigi la polan popolon, ke ĝi kulpas tion, estas malnobla agado. Mi ne dubas, ke samideano Kempe prenis sian materialon el broŝuroj de la Federacia Ministerio por Tutgermanaj Demandoj, kiu estas pure propagand-ministerio, kaj kiu raportas laŭ la principo: la sukceso estas pli grava ol la vero.

Sed tamen tiu „forpelita sileziano“ ne povas esti sen scio, ke multaj el liaj samlandanoj mortis kaj

estis morgtigataj, pro la dumvintraj, dummilitaj forpeloj el la lando kaj neniam de polaj instancoj. Estas bedaŭrinde, ke organo de Nacia Esperanto-Asocio publikas artikolojn kun frazoj, kiel la jenan: ... kaj kiam ili (la poloj) iu tage rifuzos redoni al Germanio la okcidentajn teritoriojn, ili rikoltos malamon de germanoj.

Ĉu Vi nun ankoraŭ dubas, ke la faŝismo en la Germana Federacia Respubliko ne revekiĝis? La sistema edukado, la konstanta mensogado de la propagandaj instancoj de la Federacia Respubliko Germana nun ankaŭ respeguliĝas en la linioj de la organo de GEA.

La germana generalaro ankaŭ nun ne komprenas, ke la monda turniĝos kontraŭ la germanaj intencoj, per-forte solvi problemojn internaciajn. Antaŭ du jaroj oni fanfaronis, ke 4a Germana Federacia Registaro garan-tiis al sia popolo la plej altan vivuirelon. Kaj nun ĝi volas kredigi, ke la popolo ne estas vivokapabla, pro manko da „vivospaco“. Oni nuligas bienetojn por konstrui manovrajn teritoriojn por la armeo, oni malŝparas kultureblan landon por aviadilejoj por modernaj militaviadiloj. Sed oni deklaras nacian mizerstaton. Malkaŝe oni preparas militiron kontraŭ la oriento, por „renovigi Eŭropon“, Eĉ la nomo de Dio estas misuzata, por atingi tiun ĉi celon.

La popoloj de Eŭropo konas la germanan faŝismon. Ĝi nun en alia vesto volas ree ekmarŝi. Kaj Esperanto-movado per sia organo subtenas tiun ĉi intencon.

La tero havas panon por ĉiu. Kaj se la germana popolo volas esti samrajta kaj estimata (ne timata), ĝi serĉu vojon, por vivi kune kun la ceteraj popoloj en la mondo en paca kunesto. Nova milito nur antigus, ke la germana popolo estus nuligita. Sed se la germanaj militemuloj ripetus siajn atakojn kontraŭ siaj nabaroj la trian fojon, ĝi poste ne plu ekzistus.

R. Zimmermann, GDR.

Francio en la tagordo

Depost pluraj jaroj nia lando sekvis vojon, kiu malĝojigis ĉiujn pacamikojn kaj progresemulojn. La senĉesaj, obstinaj militoj, unue kontraŭ Vietnamo, nun kontraŭ la alĝeria popolo, la persona regado, kiun nepre akompanis reakcia konstitucio kaj leviĝo de faŝistaj, militistaj kaj antikulturaj fortoj, la eksplodo de A-bomboj malgraŭ la fakta ĉeso de nuklearaj eksperimentoj ĉe la „atomaj“ regnoj, alportas al Francio nek prestiĝon, nek simpatian de la popoloj.

Oni tamen ne forgesu, ke la historia evoluo estas ofte zigzaga kaj tute ne sekvas rektan linion. Antikomunismo, koloniistaj militoj kaj malvarma milito, amase distilitaj en la cerbojn de la homoj, fekundigis grundon por ŝovinismo kaj sociala malprogreso. Sed oni ne povas ĉiam trompi ĉiujn, kaj la franca popolo pli kaj pli mezuras la abismon, kiu diferencigas ĝin de la nuntempa registaro. Ne estas sekreto, ke malkontento kreskas en ĉiuj popoltavoloj aŭ ke la tuta popolo unuanime leviĝis kontraŭ la faŝistaj ribelantoj de Alĝero.

Nova faktoro ĝojiga estas la entuziasma akcepto de Nikita Ĥruŝĉov fare de la franca popolo. Tiu akcepto superis ĉiun esperon kaj la entuziasmo kreskis de tago al tago. La fanatikuloj de l'antikomunismo kaj la postrestintoj de la malvarma milito devis resti en la ombro: la stratoj apartenis al la popolo, kaj neniam oni vidis en Francio tiom da ruĝaj flagoj.

Nur la princoj de la Eklezio havis sian „venkon“, malpermesante al kanoniko Kir, urbestro de Dijon, akcepti N. fl. Kontraŭ tiu enmiksiĝo de l'Vatikano en la internajn aferojn de nia lando, la registaro ankoraŭ ne protestis, laŭ nia scio.

Restas la fakto, kiu estas esenca, ke dekmiloj da homoj tra la tuta lando aklamis N. fl. kaj manifestis sian pacvolon. Kiam ili kriis: „Vivu la paco! Vivu Nikita! Vivu Nina!“, k. t. p.... ili evidente ne montris nur simpatian al simpatiaj gastoj, ili ĉefe montris, ke iliaj koroj batas en akordo kun la pacomesaĝo de la soveta popolo. Ĉiu progresema, honesta homo trovas en la figurriĉaj kaj spritaj esprimoj de N. fl. la respondon al siaj aspiroj. La ĉefministro de Sovetunio, per simplaj vortoj klaraj

kiel kristalo, detruis ĉiujn mensogojn, reliefigis la minacon de la okcidentgermanaj revenĝemuloj kaj la urĝan neceson de ĝenerala malarmado. Ne temas pri komunismo aŭ kapitalismo; en nia epoko la urĝa dilemo estas paca kunekzisto aŭ apokalipsa milito, vivo aŭ morto. Tio signifas, ke kapitalistoj morgaŭ rezignos siajn profitojn aŭ ke laboristoj rezignos klasbatalon, sed ke milito ne plu povu esti rimedo por solvo de internaciaj problemoj, ke sur la terglobo troviĝu homoj, kiuj devos kune vivi aŭ kune pere. Tiu saĝa, simpla ideo progresadas malgraŭ ĉiuj mensogoj de la gazetaro, kaj N. fl tuŝis la koron kaj la racion de la franca popolo, ĉar li fakte esprimis tion, kion la popolo opinias pli malpli konfuze.

Sed nun al laboro! Apartenas al la franca popolo la tasko ĉesigi la militon en Alĝerio, samkiel la A-bombajn eksperimentojn en Saharo, detruu la militemajn esperojn de la naziistoj kaj trudi politikon, kiu celas al paca kunekzisto kaj al ĝenerala malarmado. Tie kuŝas la sekreto de vera grandeco kaj prestiĝo.

Ŭ. Ĵ., Francio

ESPERANTISTA MOVADO KAJ PORPACA KLOPODO INTER LA ĈEĤOSLOVAKOJ GEBLINDULOJ



La blinda presisto en la Blindula presejo en Praha (Ĉeĥoslovakio).

Ŝajnas paradoksa se oni diras, ke la blinduloj vidas pli bone ol ceteraj homoj, sed rilate al uzado de la internacia lingvo, oni plene pravas. Jam 29 kongresoj de blindaj esperantistoj, kies ĉeestantoj el multaj landoj interŝanĝadas siajn fakajn spertojn kaj pritraktadas siajn ekzistencajn problemojn sen iu ajn tradukisto, kiare pruvas tion.

En Ĉeĥoslovakio la esperantista movado inter la geblinduloj estas jam preskaŭ kvindekjara. Ĉirkaŭ la jaro 1910 ellernis esperanton la ĉeĥa blinda muzikkomponisto kaj blindulpedagogo K. Em. Macan, kiu sukcesis por ĝi baldaŭ varbi kelkajn el siaj blindaj gelernantoj. La brajle presita esperantista gazeto „Esperanta ligilo“, kiu jam depost la jaro 1904 aperadas en Stokholmo, estis por li kaj por la juna esperantista grupo grava helpilo. La junaj blindaj geesperantistoj vigle korespondis kun siaj eksterlandaj samsortanoj kaj spertadis, ke esperanto povas esti tre valora helpanto por la blindulafero. K. Em. Macan proponis, ke dum la universala kongreso de esperanto en Parizo 1914 partoprenu ankaŭ la blinduloj, kaj ke ili pridiskutu ĉi tie la eblecon, organizi en la kadro de universalaj kongresoj specialajn blindulajn fakkongresojn. Li eĉ sukcesis gajni monrimedojn por

vojaĝo de la ĉeĥa blindulkaravaneto al Parizo. Sed, bedaŭrinde, la komenco de la unua mondmilito malebligis ne nur la vojaĝon al Parizo, sed ankaŭ la kongreson.

Samideano Macan tamen ne forlasis la ideon. Kiam en 1921 okazis en Praha universala kongreso de Esperanto, li sukcesis en ĝia kadro organizi la unuan kongreson de blindaj esperantistoj. Eble la plej bona pruvo pro la ĝusteco de tiu ĉi ideo estas la fakto, ke en 1960 okazas en la kadro de nia brusela UEK jam la 30-a kongreso de blindaj esperantistoj.

En la jaro 1922 komencis Macan eldonadi brajle presitan esperantan revueton „Aŭroro“, kiu aperadas ĝis nun. Nuntempe ĝi aperadas ĉiun duan monaton kaj estas legata de blindaj esperantistoj en 36 landoj. Ĝia celo estas servi al la ideo de mondpaco al la paca kunvivado de popoloj kun malsama socia kaj ekonomia sistemo.

Ĝi informas la legantojn pri la sukcesoj de blindula edukado kaj prizorgo en la socialistaj landoj. Kompreneble ke ĝi ankaŭ informas pri esperantista movado en la tuta mondo. Necesas eble ankoraŭ aldoni, ke „Aŭroro“ estas eksterlanden sendata senpaga; tio estas donaco al la eksterlandaj blindaj esperantistoj flanke de la „Ligo de ĉs. invalidoj“, kiu estas la unueca organizaĵo de ĉiuj ĉeĥoslovakaj civitanoj kun iu ajn difekto, do ankaŭ de la blinduloj. Tiu ĉi organizaĵo posedas grandan porblindulan presejon, kiu estas tute pagata per la ŝtata subvencio.

En la historio de esperantista movado inter ĉs. geblinduloj aperas periodoj de prospero kaj eĉ periodoj de malprospero. Estis tempoj, kiam estis organizitaj esperantokursoj en ĉiuj ĉeĥoslovakaj blindul-lernejoj, kaj estis periodo dum la naziista okupacio, kiam estis esperanto en nia lando tute malpersita. Tiam ankaŭ ne aperis la „Aŭroro“, sed spite tion, esperanto inter ĉsl. geblinduloj ĉiam vivis. Ĝi estis por ili ĉiam la ilo por gajni spertojn pri la blindulmovado en aliaj landoj kaj eluzi ilin por plibonigo de la stato de nia blinduledukado kaj blindulprizorgo. Depost kiam nia popolo ekmarŝis vojon al la socialismo, fariĝis esperanto ankoraŭ pli valora ne nur por la blindulafero, sed por partoprenado de blinduloj en paca batalado por forigo de militoj kaj por forigo de ĉio, kio la popolojn disigas.

Estis nemezureble potenca sento, kiam la kunlaborantoj de la Aŭroro-redakcio okaze iliaj vizitoj en Moskvo, Leningrado kaj Varsovio renkontis la Aŭroro-legantojn el multaj landoj kaj povis konstati, kiel multe la blinduloj ŝatas kuniĝadon, kunlaboron, amikecon kaj pacon. Por li estas Esperanto vera vojo de koro al koro. Ni ĉiuj povus esti feliĉaj, kiam ankaŭ la vidantaj homoj same rilatos la internacian lingvon.

En 36 landoj estas nun aŭdata la voĉo de „Aŭroro“. Ni finas kun la peto, ke la vidantaj esperantistoj-pac-defendantoj atentigu pri ĝi pluajn blindajn esperantistojn en siaj landoj. Ĝi estas senpage ricevebla ĉe Slepecká tiskárna, Krakovská 21, **Praha 2**, Ĉeĥoslovakio.

A. S. Nikitin

ILUSTRAĴO POR LA NEVERKITA LIBRO

(legendo)

Ĉe la limo de urbo, kies nomo renkontiĝas jam en antikvaj rusaj kronikoj, staras malnova ŝtona domo. En tiu ĉi domo en grandaj ĉambroj kaj ega salono troviĝis miloj da libroj.

Apud la domo, en malgranda arba dometo vivis maljuna altrangulo, restinta sen posteno. Lia nomo estis Eŭgeno Dmitriĉ. Ankoraŭ sufiĉe forta, li estis nur iom surda post paralizo. Li diligente laboris, celante verki libron pri la gloro de Rusio. Por tio li bezonis vizitadi la apudan domon.

Ĝuste, je la sama horo, li eniris la domon, sidiĝis sur kutima loko kaj malfermante libron, profundigis je esploro de ĝia enhavo. Dum la laboro li rimarkis nek tempon nek epizodojn, traflugantajn super lia kapo.

Unufoje, veninte en la librejon, li rimarkis neordinaran movon, kiu regis inter personoj, konataj al li, kiel mastroj de la domo. Sed li baldaŭ tute forgesis pri tio kaj daŭrigis labori ĝis kiam li ekvidis,

ke li restis tute sola en la ejo. La mastroj forkuris el la urbo. Tiel en lian vivon eniris la Revolucio.

Aŭtunan matenon en la domon venis nekonataj homoj, vestitaj en ledaj jaketoj kun pistoloj sur flavaj zonoj. Ili estis forveturontaj al batalfronto kaj serĉis librojn, konfirmantajn kaj glorigantajn la batalon por libero.

Kaj la maljunulo per mallaŭta voĉo rakontis pri la libroj, travivintaj multajn revoluciojn kaj militojn. Montrante la librojn al ili, li delikate karesis la kovrilojn, kiel se ili estus plej ŝatataj objektoj.

— En tiuj ĉi libroj, — finis li sian rakonton, — saĝulo trovos respondojn al demandoj kaj solvojn de problemoj, kiujn la vivo al li starigos, malsaĝulo deturnos sin de ili, kaj frenezulo eĉ malinde ilin uzos.

Aŭskultinte la maljunulon, la homoj respektplene demetis siajn ĉapojn kaj neaŭdite marŝis al eliro.

— Gardu, paĉjo, la trezoron, — diris la pli aĝa el ili, kiun aliaj nomis „kamaradestro“. — Viaj libroj estos necesaj por la popolo. Kiam ni liberigos nian landon, ni lernigos niajn gefilojn; ili traĝos la librojn kaj prenante de ni revolucion sperton ili estos la plej saĝaj homoj en la mondo. Sciencistoj kaj popolgvidantoj el aliaj landoj vizitados ilin por preni lecionojn pri racia aranĝo de la popola vivo. Je la nomo de venonta generacio, — rigardante rekte en la okulojn de la maljunulo, diris la pli aĝa, — mi ordonas al vi: gardu la riĉaĵon de la popolo same sindoneme, kiel ni batalos por liberigo de nia patrolando. Adiaŭ, paĉjo, atendu nin. Ni revenos!

— Haltu! — ekkriis la maljunulo. Vi parolis je la nomo de venonta generacio, sed kial vi opinias, ke la generacio venos la saman vojon, kiel vi? Kiu saĝulo enmetis tian kredon en la korojn de vi kaj de viaj kunbatalantoj?



Kaj la homo estis nomata Vladimir Iljiĉ Lenin.

La homoj foriris. La maljunulo restis sola.

La librejo fariĝis malplena. Kaj apenaŭ sunsubiris, mallumo plenigis la ĉambrojn de la domo, ĉar

elektra fluo ne plu estis ricevata en la malnova domo. Nur malsanulejoj kaj provizejoj ricevis la lumon. Tiam Eŭgeno Dmitriĉ ŝlisis la pordon kaj iris hejmen. Tie li, iom maĉante per maljunaj dentoj fermentintan avenon, kiun oni donis anstataŭ pano, li sidigis malantaŭ tablo kaj daŭrigis skribi sian manuskripton ĉe la lumo de kandelo.

Alproksimiĝis vintro kaj kune kun ĝi malsekeco kaj malvarmo. Foje Eŭgeno Dmitriĉ ekvidis disrompitan vitron en fenestro. Malseka vento alportis tra la truo nubojn de pluvo kaj neĝo. Tio minacis al konservado de libroj. Tiutempe oni ne povis trovi novan vitron. Eŭgeno Dmitriĉ demetis sian lanan kamizolon kaj ŝtopis per ĝi la truon. Poste, kiam venis frostoj, la muroj de l' ejo blankiĝis per prujno. El la buŝo de la maljunulo elvenis vaporo, liaj piedoj glaciigis en la ĉifitaj feltbotoj, la fingroj de l' manoj fariĝis neflekseblaj. Sed li ĉiutage malfermis la pordon de l' ejo, esperante, ke iu eniros, portante lumon kaj varmon. Sed neniu venis.

Unufoje, malvarman vintran matenon, Eŭgeno Dmitriĉ decidis iri en la urbon. Kiam li eliris la domon, sur sennuba ĉielo brilis nevarmiganta suno, kaj ĉirkaŭ ĝi, simila al grandega krono super la tero, pendis lakta rondo. La urbo estis kovrita per dika tavolo de neĝo. Neniu purigis la trotuarojn kaj stratojn. La maljunulo iris sur la neĝa kovrilo sen vojo. Malfortiĝinta, li trenis sian frostiĝintan korpon al oficejo, en kiu, oni diris, estis komisaro, kiu devis zorgi pri la librejo. Li eniris la plej grandan domon ĉe la centro de la urbo kaj longtempe serĉis la komisaron. Tiu sidis malantaŭ tablo en felta ĉapo kaj botoj. Sur liaj ŝultroj estis pendanta mallonga pelto.

— Kiun vi deziras? — demandis la komisaro.

Kaj Eŭgeno Dmitriĉ rakontis pri la malvarmego en lia librejo kaj pri tio, ke se hejtlignaĵo kaj petrolo ne estos ricevita, la libroj difektiĝos kaj li eĉ ne rimarkos ĝustatempe tion, ĉar la ejo ne havas lumon.

Sed la komisaro ankaŭ ne havis hejtaĵon kaj petrolon.

— Kiel do vi mem vivas? — demandis la komisaro.

— Jen, prenu kvitancon por duonkilogramo da milio. La maljunulo dankis kaj sin turnis al la eliro. Sed elirante, li demandis, kiu estas tiu, kies portreto pendas super la kapo de la komisaro.

— Lenin, — mallonge li respondis.

Reveninte hejmen, Eŭgeno Dmitriĉ unufoje ne malfermis la pordon de la librejo, sed rekte eniris sian dometon. Maldolĉa sento de izoliteco kaj senhelpo ĉirkaŭprenis lin. La espero pri la helpo de komisaro estis ruinigita. Li pensis ne pri si mem, sed nur pri la libroj. „Mi konservos ilin ĝis la reveno de la homo en leda ĵaketo kun pistolo sur sia zono,“ decidis li post pripenso. „Ili devas travivi malfacilan tempon.“

Morgaŭ al la aparta domo alveturis aŭtomobilo, el kiu eliris du viroj. La unua estis alta, seka kun dikaj brovoj, en kies ombroj sin kaŝis akraj mallumaj okuloj. Granda agla nazo elŝoviĝis el malfaldita fela kolumo de lia bona pelto. Lia vizaĝo estis longa, liaj vangoj estis pure razitaj kaj nur sur la supra lipo vidiĝis prujnkovritaj lipharoj. Li facile transmarŝis neĝamason kaj sin levis sur ŝtuparo, marŝante trans du ŝtupojn unumove. La alia homo estis pli malalta ol la unua, li havis rondan vizaĝon kaj sur lia nazradiko sidis dikaj kvarangulaj okulvitroj. Li suferis astmon kaj ne sukcesis ĝustatempe atingi la altstaturan, kiu jam staris apud la pordo, kiam la dua ne ankoraŭ proksimiĝis al la unua ŝtupo.

Ili eniris. Eŭgeno Dmitriĉ sidis malantaŭ tablo kaj riparigis libron. Ĝi estis iom difektita pro frostoj. La maljunulo per sia spiro varmigis la glacieton, celante plej delikate detiri ĝin de la kovrilo. Li ne rimarkis la enirintajn virojn kaj estis mirigita, aŭdante fremdan voĉon.

— Bonan matenon, sinjoro! La maljunulo levis la ka-pon.

— Kiun vi deziras? — li demandis.

— Ho, kia terura malvarmo! Diabla frostoj tie ĉi estas. Sed ni helpas al vi. La libroj estas granda

riĉaĵo de Rusio. Ni deziras savi vin kaj la librojn.

La maljunulo reviviĝis. Kiel rapide la helpo venis! Nur hieraŭ li iris en la urbon kaj hodiaŭ ĉi tiu duopo jam estas preta ion fari.

— Ĉu vi alveturigis hejtaĵon?.

— Ho, jes. Vi havos sufiĉe de ĉio. Estos lumo kaj varmo ĉi tie. Ĉu vi permesos al ni trarigardi vian ejon? —

— afereme demandis la altstatura homo.

— Pro dio! Bonvolu iri malantaŭ, mi — invitis la maljunulo. Ŝajnis, ke li ricevis novan forton. Kondukante ilin laŭlonge de la bretaro, li volis rakonti pri la libroj. Sed la vizitantoj rapidis kaj neatente lin aŭskultis. Krome, ĉi tie estis tro malvarme kaj tio ne emigas al interparolado. Temp' al tempo jen la unua, jen la dua eltiris platan boteleton el la poŝo kaj deŝraŭbinte metalan kovrilon, glutis el ĝi iom da varma fluidaĵo. La pli malaltstatura precipe silentis, sed iam faris rapidmaniere kelkajn notojn en sia notlibro.

Fininte rapideman trarigardon, la altulo sin turnis al la maljunulo.

— Jen estas listo da libroj, kiujn ni prenos de vi anstataŭ hejtajo kaj provizo. Morgaŭ nia ŝarĝaŭtomobilo alveturigos al vi ĉion necesan, kaj vi preparu al tiu tempo la librojn.

— Ĉu vi volas forveturigi la librojn, — ekmiris Eŭgeno Dmitriĉ, — sed kien?

— En landon de granda demokratio, en Usonon. Ni estas amikoj kaj militliganoj de la rusa popolo. Ni konservos la librojn ĝis pli bona tempo. Ni donos al vi multe da hejtaĵo, multe da produktaĵo kaj sufiĉe da dolaroj. Vi havos indan vivon.

La maljunulo sin rektigis. Li kvazaŭ juniĝis, ĉar lia sango penetris en lian vizaĝon.

— Vi deziras min senvivigi?

— Ho, vi timas, ke bolŝevikoj, tiuj barbaroj, pafmortigos vin, sed vi ne timu! Vi do havos multe da mono kaj ekpovos vin aranĝi bone en nia lando.

— Iru for! — ekkriis la maljunulo. — Mi estas ruso. Mi neniam konsentos je tiom malhonesta propono. Mi vin konsideris kiel civilizitajn homojn, sed vi estas komercaĉuloj, vi deziras aĉeti mian konsciencon sed vi eraras. Ĉi tie ne estas butikoj. Do, iru for! Baldaŭ!

— Vi bezonas vin trankviligi. Vi bone pripensu nian proponon. Ja neniu ekscios pri tio... Kaj se vi ne konsentos, vi tute egale mortos tie ĉi kaj viaj libroj pereos. Sed ni donos al vi vivon. Pripensu bone!

— Mi havas neniun temon kun vi priparoli. Iru for!

Kaj ili foriris.

La maljunulo prenis ĉifonon kaj diligente viŝis ĉiun libron, al kiu tuŝis la manoj de la sinjoroj. Poste li fermis la pordon de ejo, iris hejmen kaj longtempe iradis tien kaj reen en sia senviva domo, enprofundiĝante en siaj pensoj. Fine li eliris en vestiblon, prenis tie segilon kaj hakilon kaj reveninte en la ĉambron, li komencis disrompi la tablon por hejtaĵo. La hejtaĵon li alportis en la librejon kaj ekhejtis la fornon en la ĉambro, kie estis la plej valoraj kaj neordinaraj libroj. De disverŝigita varmo ekfluis riveretoj al la muroj, kovritaj per prujno. La maljunulo alportis ĉifonon kaj la tutan tagon batalis kun la degelo.

Tiel komenciĝis nova etapo en la vivo de la ejo.

Ĉiutage la maljunulo rompis, segis kaj fendis ion el la mebloj de lia domo. Li deziris savi la librojn. Li ekhavis la celon de sia vivo.

La vintro pasis. Venis printempo.

Denove la homoj, vestitaj en ledaj jaketoj kun armiloj en siaj manoj, venis en la librejon. Sur malmola lito, farita el libroj, ili trovis senfortigitan maljunulon. Li estis tiom malforta, ke li ne povis sin levi por renkonti ilin.

— Patro, — ili diris, — ni alportis al vi sciigon pri la venko!

La maljunulo silentis. Ŝajnas, ke li ne aŭdis ilin. Nur liaj okuloj maltrankvile serĉis iun meze de la venintaj. Etendante siajn manojn, li penis ion diri al ili.

— Kion li deziras? — flustradis ili. — Demandu lin, Semjon.

Kaj la plej juna el ili sin klinis super li.

— Ĉu vi ion bezonas? — li demandis.

— Kie estas li? — mallaŭte diris la maljunulo. Kial li ne venis kune kun vi?

— Ha, vi deziras scii pri tiu, kiu nin kondukis al la ba-talo, pri nia estro? — konjektis Semjon. — Bedaŭrinde, li restis sur la bataalkampo. Li estis morte vundita, sed mortante li pensis pri vi kaj li igis nin juri, ke ni zorgu pri vi. Jen ni venis por helpi vin.

La maljunulo ekscitiĝis. Grandaj gutoj de larmo ek-fluis sur liaj vangoj. La espero, subtenanta lin, nun rui-niĝis. La homo, kiun li tiom ege atendis ne plu revenos.

— Mi estas jam maljuna kaj malforta homo. Mi bezo-nas nenion. Sed mi konservis ia librojn, laŭ mia promeso. Mi deziris lin vidi por ke ... La maljuno eksilentis ne povante trankviliĝi.

— Vi ne plu zorgu pri tio. Nun ni gardu la trezoron. Vi bezonas ripozi kaj vin plifortigi. Kie estas via domo? Ni vin kondukas tien.

— Mia domo... mia domo... Mi ne scias, ĉar mi ne estis tie delonge.

La homoj aliris al la dometo, sed anstataŭ ĝi ili trovis nur aron da brikoj de disrompita forno. Ili pensis, ke la dometo estis forbrulinta per incendio, sed rigardante pli atenteme, ili ekvidis, ke la dometo estis zorge disme-tita je traboj kaj la traboj estis transformitaj je hejtaĵo. Ili komprenis ĉion.

Post kelkaj semajnoj du homoj, vestitaj en ledaj jaketoj, delikate subtenante la maljunulon sub la kubutoj, enkondukis lin en nekonatan al li kabineton. El malantaŭa tablo por lia renkonto sin levis mezstatura homo kun kapo de Sokrato kaj kun malgranda flavruĝa barbeto kaj saĝaj okuloj.

— Saluton, saluton! — afable li diris al la maljunulo, etendante al li sian manon. — Bonvolu sidiĝi ĉi tien, — montris li sur profundan ledan brakseĝon, — vi bezonas iom ripozi. Alportu al ni teon, — ordonis li al sekretario, — kun sukero kaj biskvitoj!

Eŭgeno Dmitriĉ rigardis la homon, ne povante reme-mori, kie kaj ĉe kia okazo li vidis lin. En lia memoro ekstaris la urbo, kovrita per dika tavolo de neĝo, kaj la ĉambro de la komisaro kun la portreto super lia kapo. Kaj subite, kvazaŭ fulmo, lian cerbon ektranĉis konjekto: — tiu ĉi homo estas Lenin!

Li volis leviĝi, sed Vladimir Iljiĉ observis lian movon.

— Bonvolu sidigi vin — li diris, — kaj jen estas teo. Li prenis alportitan per la sekretario teon kaj teleron kun biskvito. Li mem metis sukeron en la glason kaj solvante ĝin per kulereto, alpuŝis la glason al la gasto.

— Do, kiel vi fartas? — li demandis.

Mi vin tre dankas, — respondis la gasto. Li rigardis sur Lenin kaj ne povis decidi kiamaniere sin teni kun la homo, pri kiu li sciis tiom multe kaj samtempe ne-nion. Kiel konulo de malnova tabelo de rangoj li bone komprenis, ke li sidas antaŭ la gvidanto de grandega lando, kaj kiel enciklopedie klera li vidis en Lenin gran-dan scienciston, kiu ekbruligis per siaj ideoj la korojn de milionoj da homoj. Li estis konfuzita.

— Nu, rakontu al mi, kio do okazis al vi? — demandis Lenin, ridetante.

— Mi havas nenion por rakonti, Vladimir Iljiĉ, fuŝ-parolante respondis Eŭgeno Dmitriĉ. — Jen la kamaradoj zorgis pri mi kaj nun mi estas ĉe vi. Jen estas ĉio.

— "Jen estas ĉio", — ripetis Lenin, enpenŝigeme tamburante per siaj fingroj sub la rando de la tablo. — Sed oni diras, ke vi forpelis iujn fremdlandanojn ?

— Mi nur petis ilin foriri!

— Ha, vi petis ilin foriri! Tre bone! Bonege! Tamen, kial do ili al vi ne plaĉis? Oni diras, ke ili ion proponis al vi?

— Jes, Vladimir Iljiĉ, ili al mi proponis, ke mi fordonu al ili altvalorajn librojn, apartenantajn al Rusio. Sed mi estas Ruso. Mi rifuzis la proponon. Tio ne konvenas al mia koncepto pri honoro.

— Ili tion ne komprenas, — malrapide, kvazaŭ enpenŝigante diris Lenin. Por mallonga tempo li eksilentis. — Imagu, mi ĵus trarigardadis raporton de Nov-Jorka publika biblioteko. Kaj ĉu vi scias, kiu estis la unua libro, postulita de ia legantoj? Tiu libro estis ruslingva verko de N. Grot „Moralaj idealoj de nia tempo“. Lenin ekridis. — Tamen, tiu libro, evidente, al ili ne helpis. — Li denove iĝis serioza. — Ili al vi proponis dolarojn, hejtaĵon kaj privizion. Sed ni dume povas proponi nenion. Ni estas mizeraj homoj. Ni ne havas hejtaĵon, niaj fabrikoj ne funkcias. Tio estas la vero. Li paŭzis. Kaj ankaŭ la vero estas, ke ni ne povas preni ĉiujn librojn, kiu estas en nia lando. Ni devas organizi multon da bibliotekoj por ke la popolo utiligu ĉiun libron, kiun ni havas. Vi konservis por ni librojn, nun vi devas helpi al ni pliordigi la utiligadon de ili. Ĉu estas vero, ke vi forbruligis vian domon por savi la librojn?

— Mi havis nenan eliron. Krome, la libroj helpis al mi je mia verkado de la libro pri gloro de Rusio.

— Kies Rusio? — rapide demandis Lenin.

— Mi petas pardonon, sed via demando por mi ne estas komprenebla.

— La gloro de kiu Rusio? — mi demandas.

— Rusio estas unuo, al mi ŝajnas.

— Ne, paĉjo, ne ekzistas unika Rusio. Estis Rusio de nobelaro kaj de bienposedantaro, sed ni konstruas Rusion socialistan.

— Mi malbone analizas politikon.

— Vi intencas diri, ke vi ne ankoraŭ komprenas nian politikon? Sed vi ja staris ĉe la direktilo de la politika potenco en mainova Rusio, ĉu ne ?

— Jes, tio estas la vero. Sed lastatempe mi multe pensis kaj mi ŝanĝis miajn opiniojn pri pluraj objektoj.

— Ĉu tio signifas, ke vi estas preta al ni helpi?

— Sed mi estis reprezentanto de la malnova Rusio, ĉu mi povas enporti ion utilian?

— Pri via demando estas du problemoj. Se vi honeste pensas, observante la vivon de la nova Rusio, tiu cirkonstanco ne konfuzu vin. Revolucio, kiu povus per unu fojo venki kaj konvinki, tia revolucio tute ne ekzistas. La malnovaj socialistoj-utopianoj imagis, ke estas eble konstrui socialismon kun aliaj homoj, ke komence ili eduku bonajn, purajn, belege edukitajn homojn kaj per ili la socialismo estos konstruita. Tio estas pupa ludo. Tio estas amuzaĵo por buterpanaj fraŭlinoj, sed ne serioza politiko. Nun la alia problemoj. La bibliotekaro ĉe ni estas starigita malbonege, tio estas la rezultato de multjara difektado de la popola instruado. Oni devas ordigi tiun ĉi aferon. Ĉiu, kiu volas labori, estas por ni necesa. Ja vi scias fremdlingvojn?

— Mi konas sep eksterlandajn lingvojn. Mi scias ankaŭ tri malvivajn: latinan, grekan kaj sanskritan.

— Jen, ni vidu, la specialistojn ni bezonas. La librojn ni transportos en la bibliotekon de Rumjancev. Tie, ie-ajn proksime, en unu el la stratetoj de Arbat, ni trovos por vi la dometon, estimata Eŭgeno Dmitriĉ, ĉu mi pravas?

— Vi pravas, Vladimir Iljiĉ. Dankon.

— Nu, bonege! Jen, prenu la gardan edikton de Soveta registro. Bonan sukceson al vi. Ĝis revido! La manjunulo leviĝis, forte premis la manon de Vladimir Iljiĉ kaj mallaŭte eliris la kabineton, tenante ricevitan paperon en sia mano.

En la koridoro li atenteme tralegis la paperon, ekridetis, kaj kvazaŭ juniĝinte, sin direktis al la pordoj.

Li ne plu daŭrigis sian verkon. Kun dekobla energio li sin redonis al la laboro en la biblioteko. Li elektadis unikajn librojn por ke ili estu akireblaj por popolo. Li starigis kunligojn kun eksterlandaj bibliotekoj por ŝanĝado de libroj kun ili, li instruadis bibliotekistojn el junaj laboristoj kaj kamparanoj. Li denove sin sentis utila por sia patrolando.

Li mortis en profunda maljuneco, ne sukcesante pripensi de la nova vidpunkto la temon, kiun li projektis priskribi en la libro, sed la finalo de lia vivo estis brila ilustraĵo por la neverkita libro.

LIBERA TRIBUNO

Argumentoj kaj kontraŭargumentoj

Fidelaj legantoj de PACO kuraĝigas de temp' al tempo la redakcion per artikoloj. Tiel faras ankaŭ la soveta kamarado Aristov. Sed lia artikolo, kiu aperis en la januara numero, ne plaĉas al la dana MEM-peranto W. Nielsen, kiu per longa skribaĵo argumentas kontraŭ ĝi. Por ke ankaŭ Aristov eldiru sian opinion, ni transdonis al li la verkaĵon de Nielsen. Sed montriĝis necese, pro manko de spaco, forigi tiajn alineojn, kiujn ne havas kunligon kun la origina artikolo. Ili temas pri vizoj kaj turistvojaĝoj, pri Ĉinio-Tibeto, pri la ĉina-hindia limdisputo, pri la soveta aktiveco en Hungario 1956. Por kontentige okupi nin pri tiuj aferoj, ni bezonus la tutan spacon de la gazeto. Ankaŭ MEM-anoj povas havi malsamajn konceptojn pri pacpolitiko. Ili diskutu ĝin. Kaj la internacia korespondado povas bone kompletigi PACO-n tiurilate.

Redakcio. Willy Nielsen, Danlando

VORTOJ ESTAS BELAJ...

Jam mallonge da tempo post mia aliĝo al MEM tuj post ĝia fondiĝo, mi decidis denove eliĝi, ĉar la enhavo de „Paco“ ŝajnis al mi tro politika, malgraŭ la vortoj en nia manifesto. Koncerne eliĝo mi turnis min al nia tiama prezidanto, k-do Burda en Plzeň. Mi deklaris en mia letero, ke laŭ mia opinio la gazeto tro multe okupis sin pri socialisma propagando kaj tro malmulte pri la porpaca laboro. K-do Burda skribis al mi, ke bona rimedo por eviti tian politikan evoluon de nia movado, estas, ke ni esperantistoj el la kapitalismaj landoj restu membroj kaj tiel kunhelpu pri ĝia kreado per kontribuoj kaj porpaca laboro. Mi devis konscii, ke k-do Burda estis prava, kaj tial mi restis dana peranto de MEM por Danlando. Poste mi plurfoje sendis kontribuojn al nia organo, sed bedaŭrinde mi devis konstati, ke ĉiun fojon, kiam mi skribis pri iu temo opinion, kiu ne paralelas kun la oficiala programo de la komunistpartioj de la popoldemokrataj landoj, oni ne publikigis miajn artikolojn. Dume oni publikigis amason da propagandaj artikoloj pri la socialismo kaj ĝiaj benoj en la socialismaj landoj kaj pseŭdosciencaj artikoloj laŭ Jules Verne pri sputnikoj kaj raketoj.

Nun mi demandas al vi: „Ĉu „Paco“ estas organo de pacmovado, aŭ ĉu ĝi estas organo de komunistpartio?“

Frapa ekzemplo de la unuflankeco kaj politika diaektiko estas la artikolo de B. Aristov en la januara numero de „Paco“ ĉijare, en kiu li envolvas kelkajn verojn, kelkajn duonajn verojn, kaj kelkajn personajn teoriojn en nebultapiŝo de propagandaj devizoj kaj paoloj el politika origino. En tiu li atakas la pekojn de la burĝa mondo. sen eĉ revii pri tio, ke eble ekzistas paralelaj pekoj flanke de socialismaj landoj.

Unue li kulpigas la burĝan demokration pri la unua mondmilito. Ĉu prave? Nu, jes, tiutempe ja nur ekzistis en Europo burĝaj demokratioj, do la militoj nur povis aperi inter tiaj ŝtatoj. Poste li skribis, ke el la grundo de la burĝa demokratio kreskis tia fiherbo kiel la faŝismo, nu, jes — sed ĉu vi scias, ke el la sama grundo kreskis laŭ vi tre bela floro, nome la socialismo en 1917. Vi sciu, k-do Aristov, ke ne la grundo decidas la specon de la kreskaĵoj, sed la semo decidas.

La burĝa demokratio ne povis deturni sin de la katastrofo de la dua mondmilito, skribis k-do Aristov. Ĉu la socialisma Sovetio povis? Kaj ĉu ne cetere Sovetio eĉ faris pakton kun la Hitlera Germanio en 1939, per kio ili fakte dividis inter si la potencon en orienta Europo. La kapitalisma mondo vere faris multajn erarojn koncerne Hitleran Germanion, sed la sinteno de Sovetio ankaŭ ne estis tre flata. Kaj kio kreskis el la grundo de la socialismo? La stalinismo, kiu faris multajn krimojn kaj kostis multajn vivojn al Sovetio pro ĝia sekreta polico k. t. p.

K-do Aristov deziras, ke la popoloj mem decidu rekte — supozeble per plebiscito — pri membreco de NATO. Vere estas bona ideo, tiurilate mi tute samopinias, sed ĉu la popoloj de la socialisma mondo mem decidas pri sia membreco al la Varsovia pakto? Ĉu vi forgesis, kio okazis, kiam Hungario volis mem decidi pri sia eliĝo el la Varsovia pakto? Vere estas prave, ke la popolo mem devus decidi rekte pri tia membreco, sed ne nur de NATO, ankaŭ de la Varsovia pakto.

Fine k-do Aristov tre prave diras, ke ni devas diskuti kaj trovi komunajn elirpunktojn por nia porpaca agado — sed kiel diskuti, kiam nia organo nur publikigas la opinion de tiuj, kiuj jam samopinias?

Vere estas mia granda deziro, ke nia gazeto fariĝu vera pacilo kaj portanto de vera kulturo, sed por atingi tion ni devas postuli, ke ĝi okupu sin nur pri pacpolitiko. La batalo por socialismo eble havas pactendencon, sed ankaŭ kelkfoje tendencon al perforto, kaj tiu laboro estas tasko de la socialistaj partioj, ne de nia gazeto, kiu laŭ la manifesto de MEM estu absolute politike neŭtrala. Bonvolu memori tion, vi socialistoj. Kune ni batalas nur por la paco. Vian ideologian batalon — aŭ militon — vi faru en alia kadro! Alia afero estas, ke tute ne eblas amase disvastigi pacgazeton en la okcidenta mondo, kiam ĝi havas klaran socialisman tendencon anstataŭ pactendencon. Kaj kiom valoras pacmovado, kiu nur funkcias en unu el la du kontraŭaj mondsistemoj ?

B. Aristov, USSR

Ĉu „PACO“ IMITU „LA VIRON EN SKATOLETO“?

1. Troviĝas pacamikoj — kaj k-do Nielsen estas unu el ili — kiuj opinias, ke oni en la kunlaboro kun ceteraj pacamaj fortoj devas en sama etendiĝo deteni sin tiel de la socialista kiel de la kapitalista tendaro, ĉar tio signifus, ke la pacfronto fariĝus pli ampleksa. Por tiu celo Nielsen volas meti buŝoseruron al la komunistaj MEM-anoj. Ili nur havus rajton legi „PACO-n“, sed ili ne havus rajton skribi en ĝi ion, kio ne estas nura pacifismo. Sed, k-do Nielsen, vi postulas absurdaĵojn de marksistoj-leninistoj. Ni ne volas akcepti vian opinion kaj tiel rekte engliti en la modernan reviziismon.

2. Al la demando de N., „ĉu ‚PACO‘ estas organo de la pacmovado aŭ ĉu ĝi estas organo de komunistpartio“, mi volas kontraŭdemandi: „Ĉu troviĝas kontradikcio inter la ideo de la paca kunvivado kaj la rifuzo de la komunistoj malhisi la flagon en la ideologia batalo? Ne povas ekzisti vakuo konsidere ideologion.

Troviĝas en la mondo unu burĝa kaj unu socialista ideologio. Inter tiuj ideologioj ne povas ekzisti paca kunvivado. **Sed la ĉefaĵo estas, ke la anoj de ambaŭ ideologioj ne prenas armilojn por pruvi, ĉu la unu aŭ la alia pravas.**

Kiu diras, ke la paca kunvivado devas malestigi ĉian batalon inter ideoj, tiu ne konas la leĝojn de la socia evoluado. Kial vi, Nielsen, timas la komunistan pacideologion. Se vi ne volas akcepti ĝin, vi almenaŭ ekkonu ĝin, ĉar ĝi sendube malfermos novajn horizontojn por vi.

3. Ne estis la burĝa demokratio sed la socialista, kiu en 1917 efektivigis pacon por la rusa popolo, spite al tio, ke reprezentatoj de la carista absolutismo kaj de la burĝa demokratio (ekz. la ano de la II-a Internacio, la franco Albert Thomas) agitis sur la rusaj batalfrontoj por ke la soldatoj daŭrigu la imperiisman militon. En burĝe demokrataj landoj la laboristoj devis ankoraŭ unu jaron morti en la tranĉeoj por la interesoj de la bankieroj kaj industrimagnatoj. Poste burĝe demokrataj ŝtatoj organizis trupojn por sufoki la junan sovetan ŝtaton.

4. Se dependus de Sovetunio, la dua mondmilito ne okazus. Sovetunio pledis por kolektiva sekurecistemo inter la neagresemaj landoj, ĉar ĝi estus la efektiva vojo por konservi la pacon. Sevetunio, gvidata de la lenina tezo pri paca kunekestado inter landoj kun malsamaj sociaj sistemoj, daŭrigis dum multaj jaroj siajn klopodojn por savi la pacon, malcedeme kaj celkonscie.

Sed anstataŭ akcepti la proponojn de Sovetunio, la okcidentaj landoj (Grandbritio kaj Francio) provis logi ĝin en kaptilon — provis impliki Sovetunion sola en militon kontraŭ Germanio. Estis klare, ke Grandbritio kaj Francio tute ne estis interesataj establi unuecan fronton kontraŭ la germana agreso.

La rifuzo de la okcidentaj potencoj fari aliancon kun Sovetunio por deturni la agreson ebligis al Hitler surprizataki Polion kaj ekflamigi la duan mondmiliton.

Nur post kiam Sovetunio elĉerpis siajn eblecojn por atingi interkonsenton kun Grandbritio kaj Francio, la soveta registaro akceptis la proponon de Germanio pri neagresa pakto. Per tiu pakto Sovetunio gajnis tempon — preskaŭ du jarojn — dum kiu ĝi povis prepari sin por la neevitebla germana atako.

K-do Nielsen, kiu atakas la neagresan pakton inter Germanio kaj Sovetio, sciu, ke ekzistis kvar paktoj subskribitaj de Chamberlain kaj Hitler pri neatako kaj troviĝis tri similaj paktoj inter Francio kaj Germanio.

Per la subskribo de la pakto kun Germanio Sovet-unio disfalis la esperon de la britaj kaj francaj militistoj pri tio, ke Hitler faru finon al la ekzisto de la socialista ŝtato kaj ke ili mem povu neniigi sian plej gravan konkuranton, Germanio, malfortigita de la milito kontraŭ Sovetunio.

5. Estas konate, ke Stalin faris erarojn kaj deviojn, precipe dum la lastaj jaroj de sia vivo. Sed la negativaj flankoj neniel mallumigas la pozitivajn. Kiel eminenta teoriulo kaj organizanto Stalin gvidis la batalon kontraŭ enlandaj detrimentistoj (malutilantoj, red. rim.) kaj kontraŭ la konspiroj de la kapitalista ĉirkaŭaĵo.

6. La marksismo neniam akceptis la perforton kiel absolutan principon. Male. La marksismo ĉiam akcentis, ke la uzado de perforto estas devige altrudita. Ĝi preferas pacajn metodojn por atingi la celon, se tio estas ebla. Kaj kiam estas demando pri paco kaj milito, ĝi estas forte pacama. Sed pacamo ne signifas submetiĝon. Tial la laborista klaso, kiu aprobas la marksismon, estas preta sin levi kontraŭ atakanto por defendi la nacian sendependecon kaj la demokratajn rajtojn, kiujn ĝi akiris.

7. Ĉiuj klarvidaj homoj scias, ke se Sovetunio kaj la socialista tendaro estus malfortaj, la imperialistoj jam antaŭ longe estus komencintaj novan mondmiliton. Kiel anoj de la „pozicio la forto“, ili en 1949 fondis NATO. Por kontraŭstari ĝin por konservi la pacon, la socialistaj landoj estis devigitaj fondi la Varsovian pakton. Sed nur en la jaro 1955. Dum sia dekjara ekzisto NATO malakceptis ĉiujn proponojn de la socialistaj landoj cele al la fortigo de la paco kaj la reciproka konfido.

8. Mi opinias, ke la pacifistoj en la kapitalistaj landoj ne estas sufiĉe fortaj por povi savi la pacon. Ili bezonas aliancanojn. Sekve ili devas nuligi sian negativan — eĉ malamikan — sintenon kontraŭ la socialistaj landoj, kies politiko estas paco, kaj orientadi sin al ili.

K-do Nielsen opinias, ke mia artikolo en la januara numero de * „PACO“ estas kontraŭ la neŭtraleco de MEM. Mi ne povas imagi al mi, ke MEM estas tiel neŭtrala, ke ĝi ne toleras faktojn en „PACO“. La dana kritikanto volas, ke la enhavo de „PACO“ estu nur pactendenca. Kio estas tio? Ĉu ĝi nur estus pacifista gazeto kaj ne pabatala organo? Se ĝi fariĝus tiel, mi estas konvinkita, ke la eldonantoj en la socialistaj landoj perdis la intereson por ĝi. Kaj se la gazeto nur aperus en la kapitalistaj landoj, ĝia rolo baldaŭ estus finludita. Tial mi opinias, ke Nielsen pafas preter la celon. Anstataŭ protesti kontraŭ la enhavo de „PACO“, li direktu sian proteston al siaj hejmaj ĵurnaloj danaj, kiuj sendube ne malofte senkreditigas la pacvolon de Sovetunio kaj la pacan kunvivadon. Agu konsekvence kaj faru tiel!

*) = Aludas pri viro, sensperta pri la mondo, en novelo de Ĉeĥov.

EL LA LETERKESTO

Kun granda plezuro mi informas Vin, ke mi tralegis la artikolon pri indonezia popolfabelo sub la titolo „DISINAVADI“ el la plumo de s-no Taŭ Taŭ Jan, publikigita en oktobro 1959.

La rakonto estas bone elĉerpita el la originala fonto, sed mi bedaŭras, ke la nomoj de la „diuloj“ en tiu fabelo estas iom malkorekte skribitaj, ĉar la ortografio estas laŭ la ĉina prononco.

Tial mi sendas al Vi korektan klarigon kiel sube:

I. Feino DISINAVADI devas esti DEWI TRISNAWATI (unu el la feinoj en la ĉielo),

Feo BADARAGULU devas esti BATARA GURU (la Di-estro en la ĉielo),

Feino SILI devas esti DEWI SRI (Diino de la Nutraĵo),

Feo VESNU devas esti DEWA WISNU (Dio de Monduma Regado),

La Vento-diablo devas esti RAKSASA (Gigant-estro en la inferno),

La homo, kiun TRISNAWATI vidis, estas MANU.

II. La kruela batalo inter BATARA GURU kaj RAK-SASA estas simbolo de senĉesa batalo de la homa penso inter: *b o n e c o* kaj *m a l b o n e c o*.

III. La montdeklivo sur kiu DEWI TRISNAWATI surterigis, estas la deklivo de la Monto LAWU, situanta en Mez-Djawa Regiono apud la urbo Surakarta.

Ĝis nuna tempo oni ankoraŭ alportas oferaĵojn al tiu loko kiel dankesprimon al la diaĵoj.

IV. La geedziĝo de DEWI TRISNAWATI kaj MANU signifas, ke la „homo“ kiel mondulo estas la plej altranga estaĵo sur la tero, kies potenco povas superregi ĉion, eĉ la cielon. Tiu geedziĝo estas ankaŭ simbolo de eterna feliĉo kaj fidela amo.

V. DEWI TRISNAWATI kaj MANU ne estis transformigataj en pajleroj, sed je bambukanoj. Pro tio la domoj de la kamparanoj en Mez-Djawa Regiono estas plejparte konstruitaj el bambukanoj, ĉar oni plenkredas, ke per tiu konstrumaterialo oni povus akiri la eternan feliĉon kaj fidelan amon inter novaj geedziĝantoj.

VI. DEWI SRI ne estis ankaŭ transformigata je pajlero, sed je riztigo. Tial ŝi fariĝas Diino de la Nutraĵo, ĉar la ĉefnutro de Indonezianoj estas la rizo.

VII. DEWI SRI estas la edzino de DEWA WISNU, kaj oni kredas, ke de ilia geedziĝo devenas la reĝaj dinastioj de Djawa-Regnoj antaŭ la alveno de Eŭropanoj en Oriento.

Jen estas mia klarigo, kaj mi esperas, ke la karaj gelegantoj de „PACO“ povu scii la filozofian signifon de indoneziaj popolfabeloj.

A. Rachman

ESPERANTO REKONATA STUDLINGVO EN HUNGARA UNIVERSITATO.

Ĉe la Ŝtat— kaj jurscienca fako de la Universitato en Budapest estas du lingvoj devigaj. Unu el ili estas la rusa lingvo. Studento de la fako petis permeson, ke li povu elekti por dua lingvo Esperanton. La dekano de la fakultato donis al li decidon skriban, laŭ kiu li rajtas studi, kiel duan lingvon, Esperanton. Sed li devas poduonjare atesti la viziton de kurso de la Popolkleriga Sekcio de la II-a distrikta Konsilantaro (distrikta magistrato) kaj ĝis la fino de la kvara semestro montri ĉe la dekana oficejo la ateston pri farita ekzameno. Tian ateston povas doni la Ekzamena Komitato de la Pedagogia Sekcio de la Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro en Budapest.

APROBA DOKUMENTO PRI HUNGARA—SOVETA AMIKECA LABORO.

La Landa Estraro de la Hungara Soveta Amikeco-Societo en Budapest donis al la Esperanto-Fakrondo „Konkordo“ de la Popolkleriga Sekcio de la II-a distrikto Honordiplomon pro eminenta flegado de la hungara-soveta amikeco per Esperanto. Ĉe la fakrondo kaj ankaŭ alilo - ke en la lando Esperanto Rondo de Hungara-Soveta Amikeco tre vigle interrilatas per Esperanto kun ĉiuj partoj de Sovetunio, pni korespondas ankaŭ kun armenaj, estonaj, latvaj, litovaj, ukrainaj kpt., interŝanĝante bildojn, spertojn, flegante veran kulturkontakton. En la Fakrondo estis specialaj kunvenoj pri Ĉeĥov, Gogol, Lenin, Tolstoj, lumbildparoladoj pri Kreml, Leningrad, Riga, pri la artoj de Grekov, Uljanova, filmoj pri Estlando, pri la Volgaregionoj kaj ekspozicio de sovetaj afiŝoj, kiujn oni uzis ankaŭ en aliaj lokoj. En budapestaj esperantokunvenoj jam kelkfoje faris viziton kaj parolis sovetaj gesamideanoj.

RECENZO

EROJ — Originala poemaro de Margorie Boulton — 368 paĝoj 16 X 22 cm; eldono Stafeto-Beletro de J. Regulo-Perez. Prezo 2,4 Usonaj dolaroj aŭ egalvaloro, plus sendokosto.

Neniam sendube, mi estis tiel embarasita por recenzi esperantistan verkon. De longe jam la libro kuŝas sur mia breto, atendante ke mi havu ĝustan — kaj justan — opinion pri ĝi. Tempe al tempe, mi relegas kelkajn erojn por trovi objektivan pritraktadon, sed la verko estas tro riĉa por ĝin resumi, tro malegala kaj diversa por eldiri trafan prijuĝon, kiu kontentigos multajn.

Ĉar aŭtorino kiel eldonisto estas valoregaj poresperantaj agantoj, ĉu oni devas sisteme laŭdi ĉiujn iliajn farojn? Sed, kontraŭe, kiam verko enhavas tian originan pensmanieron, eĉ se oni ne tute ĝin aprobas aŭ partoprenas, kiam verkistino estas tiel evidente ne nur talenta sed ankaŭ plena je amo al vivo, al homo, al naturo, kiam oni sentas ŝin ĉiam preta defendi la plej noblajn idealojn kontraŭ ĉia malhomeco, ĉu oni povas ŝin kritiki aŭ ĉikani, sen senti sin iom pretendema?

La poeziarto de M. B. estas nekontesteble originala, propra kaj en ĝia tuteco ne kutima. Ĝi esprimas riĉan kaj ardan naturon, kiun la plej eta ekstera fakto aŭ interna penso ekboligas kvazaŭ flamo neniam dormanta, revigliĝas fulme ricevante oksigenan fluon. Ĝi neniam celas facilecon, nek por la verkistino nek por la legantaro. Ŝi mem avertas nin ĉe la enkonduko al la klarigoj: „Oni apenaŭ povas kompreni seriozan poemon sen mensa penado kaj tian penadon mi nek volus nek ipovus forigi“. La vortrezoro estas abunda kaj la penso tiel subtila foje, ke ĝi eskapas mian strebadon kompreni ĝin tute kvazaŭ hidrargo ne en ujo tenita, kaj kies ĉiu gutero tendencas ĝui propran liberecon.

Kial do ne aprobi senrezerve verkon, kiu tiel ardante posedas tiom eminentajn kvalitojn? Mi tro alte estimas M. B. por ne diri senkaŝe mian opinion pri ŝia verko. Ŝi, kiu eltiras sian inspiron, instinkte aŭ konscie de ama aŭ pli ekzakte amora inklino, estas ankaŭ intelekto influita de Evangelia tradicio kaj bone komprenas min, kiam mi citas tiun principon el sama deveno „Estas multe postulata de tiuj, kiuj multe ricevis“. Unue, mi timas ke tia poezio, pro ĝia ne rekte sentebla pensmaniero ne estu akceptebla de larĝaj amasoj. Ĉu ŝi serĉis ĝuigi nur intelektulojn? Tiukaze, brave, ŝi liveris al ili nutraĵon, kiu permesas agrablajn momentojn aŭ ludojn, eĉ pripensojn. Sed, ĉu Esperanto, krom

kelkaj porfakaj libroj, ne devas, **antaŭ ĉio**, esti komprenebla de grandaj homtipoj por kiuj ĝi estu rimedo kaj armilo?

Due, ĉar mi pensas, ke kia ajn poezio devas nepre plenumi ambaŭ kondiĉojn: naskigi bildojn (ju pli precizajn, des pli potencajn) dum **legado** same kiel dum **aŭskultado** (prefere fare de talenta versdiranto aŭ -ino). Por tiu dua kondiĉo necesas ia interna muziko, kiun mi ne sentis ofte ĉe M. B. kiu tro celas mensan ekzercon.

Eble, miaj propraj sentoj aŭ opinioj ne estas agorditaj ĉe sama frekvenco kiel tiu de M. B. kaj verŝajne, multaj juĝos malsame. Mi devas konfesi ankaŭ, ke pri poezio mi estas multe postulema kaj maloftege mi trovas ion kontentigan.

Oni ne kredu tamen tiun verkon kiel ne valoran. Kontraŭe. Ĝi povas plaĉi aŭ ne, parte aŭ entute, sed neniam lasi indiferente. Iuj eroj estas iom komplikaj kaj tiuj, ĉefe inspiris tiujn pripensojn. Sed ankaŭ aliaj, pli klaraj, plaĉas al mi kaj oni ne povas trovi en la tuto ian profundan potencon.

R. Etienne, Francio

PAROLU ... ESPERANTON (denove!)

Daŭre aperas en nia gazeto vortoj, kiuj ekzistas nek en la P. V. nek en ĝia suplemento kaj tute ne estas bezonataj en nia lingvo. Jen estas novaj ekzemploj.

— en „PACO“ No 72, p. 8: **rivoltiĝinta** (anst. **ribelinta**), **beletrio** (anst. **beletro** aŭ **beletristiko**), **preso** (anst. **gazetaro**), p 3: **policio** (anst. **polico**), **k.p.t.** ...

MALKOREKTAJ DERIVAĴOJ

En „PACO“ No 70 (p. 6): „**kolonizaj potencoj**“, Trovi-ĝas **2** eraroj en la sama vorto: la radiko estas **koloni-** kio postulas **koloni-izaj**, sed **koloniizi** signifus „apliki kolonion sur ..., garni per kolonio“, au ion similan, kio estas tute nepensebla. Ĉi-tie oni uzu **koloniaj**, **koloniigaj** aŭ koloniistaj, laŭ a intencita signifo.

ELRIGARDOJ

Via-grupo estas la nomo je ligo de svedaj kaj finnlingvaj verkistoj en Finnlando. Ĉi komencos disvastigi informojn pri moderna finnlanda literaturo pere de radio, ĵurnaloj kaj aliaj aldonaĵoj.

Dum la tria kvinjara plano — 1961—1965 — oni en Ĉeĥoslovakio intencas konstrui kvin novajn teatrojn.

La ĉina filmkompanio Chanchun en la nordorienta provinco Kirin produktos dum 1960 26 filmojn el kiuj 80 % pritraktos la vivon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La unua albana opero estis prezentata la plej unuan fojon en Tirana kunlige kun la 15-jara datreveno de la fondiĝo de la respubliko. Ĝia titolo estas „Marika“ kaj ĝi estas komponita de Prenko Jakow kaj L. Siliki skribis la libreton. Ĝi temas pri konstruado de elektra centrejo.

La leterinterŝanĝo de Maksim Gorki kun eksterlandaj verkistoj en 23 landoj estos eldonataj en Moskvo en formo de libro. Temas pri ĉ. 400 leteroj.

Ankaŭ la leteroj de Bernard Shaw estos kiel eble plej komplete eldonataj. Ili aperos 1962 en Londono de la eldonejo Max Reinhardt.

Libroverko, kiu paralele priskribos la historion de Usono kaj Sovetunio de la jaro 1917 ĝis ia hodiaŭo aperos — Iau franca propono — samtempe en Usono Sovetio kaj 17 aliaj landoj. La partoj pri la historio de Usono estas skribaj de Andre Maurois, dum la historio de Sovetunio estas skribata

de Louis Aragon. Ambaŭ ricevas helpon de sovetaĵoj kaj usonaj ekspertizistoj. La franca eldonaĵo aperos printempe 1962 ĉe Presses de la Cité en Parizo.

Kompilis Visus

Pasintjare la leningradanoj festis cent mil loĝej-ricevojn. Dum la plej proksimaj sep jaroj preskaŭ unu miliono da leningradanoj ricevos ŝlosilojn al novaj, bone aranĝitaj hejmoj. En amplekso tutlanda, ĝi signifas, ke en la daŭro de sep jaroj ĉiu tria civitano iĝos loĝej-posedanto.

La produkt-kvanto de la industrio leningrada pliiĝis pasintjare je 10 %.

H. Branzburg, Luga.

Pacfilmo

Hiroŝima — mia amatino

La filmo pri la geamantoj en Hiroŝima estas tiel ampoemo kiel ankaŭ pacprediko. Du homoj (franca aktorino kaj japana arkitekto) renkontiĝas en tiu urbo, kiu dekkvar jarojn antaŭe transformiĝis en flama infero.

Dum iliaj lastaj tagnoktoj kune, la pasinteco de la virino alpaŝas en amaraj bildoj. Kaj subite ni konfrontas kun la teruraĵoj travivitaj de tiuj, kiuj daŭre portas brulvundojn pro sia restado en la atombomba fandfornego. Kaj ni ekkomprenas, ke nur se ni povas klare koncepti la suferon de la unuopulo, ni povas percepti la suleron de la amaso. Kaj tiun suferon ni neniam forgesu.

Spektanto

El la sekretariejo

INFORMO AL ĈEHOSLOVAKAJ MEM-ANOJ

Ek de la januaro 1960 Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato sola estas rajtigita reprezenti la MEM-sekcion en ĈSR kaj ankaŭ en eksterlando. ĈEK devas tial ricevi ĉiun korespondaĵon rilate la MEM-sekcion kaj „PACO“-n.

La distribuadon kaj administradon de „PACO“ en ĈSR ne plu prizorgos k-dino Bartovská en Mistek kaj k-do Burda en Plzeri, sed la Esp-rondeto de Uzina klubo „ŠKODA“ en Plzen.

Adreso: Esperantský kroužek zav. klubu ROH, ZVIL, Kopeckého sady, PLZEŇ, ĈSR.

La mortinta prezidanto de la Ĉeĥosl. MEM-sekcio k-do J. Stanek estis provizore anstataŭigita de k-do Jos. Ed. AMBROZ, Špačkova 3, BRNO-Židenice, ĈSR. Li zorgos pri la organiza vivo de MEM en Ĉeĥoslovakio.

La ĉsl. n-ojn de „PACO“ de nun eldonas la Uzina klubo „ŠKODA“ en Plzeň, kies Esp-rondeto prizorgos la distribuadon. Ĉiuj publikendaj manuskriptoj por la ĉsl. eldono de „PACO“ alsendu al Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato, Osvětový ústav, Blanická 4, PRAHA 12, ĈSR.

DEZIRAS KORESPONDI

Ĉeĥoslovakio. Du kamaradoj dez. kor. kun ges-anoj el la tuta mondo. Interŝ. il. poŝtkartojn kaj fotojn. Adr. **Phmr Josef Smola, Dolní Kralovice n-ro 9**, departemento Ledeč n. S.

Bohumil Tiaška, Frizova 26, Jihlava - 30-j. oficisto — kun ĉiuj landoj. Interŝ. PM k. PK.

Rumanio. Mi dez. kor. pridiv. temo. i k. interŝ. librojn, broŝurojn, gazetojn, il. poŝt k., esp.-insignonjn k. a. Skribu al: **Enache Virgil**, str. Ecaterina Teodorov 49, **Craiova**.

Sovet-Unio. 23-j. oficisto dez. kor. k. interŝ. il. pk, literaturon, gazetojn kpt. Adr. **Rakitjanskij Leonid**, Betonsĉikov **5-3, Kaunas 14**, Litovujo.

Torfimon Valero (20-j.), studento-ekonomiisto, dez. kor. pri moderna arto k. literaturo, sociaj problemoj k. interŝ. kun seriozaj kolektantoj artkartojn kaj pm. el okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko kaj Azio. Adr. **Kiev 71**, ul. Frunze 17, kv. 1.

K-do Viet-Dan, Vietnama ambasadorejo, Moskvo, dez. kor. kun literaturistoj, verkistoj, ĵurnalistoj kaj sendas informojn, gazetarikolojn, vietnamajn eldonaĵojn en esperanto, angla, franca, rusa lingvoj al ĉiuj amikoj de Vietnamio.

Alo Leis, studento, 22-jara, str. Lulsi 19-7, Tartu, Estonio, interŝ. pk. pm, gazetojn, fotojn kaj aliajn objektojn kaj korespondas pri diversaj temoj.

Hungario. Gekursanoj dez. k. per bildkartoĵ. Adr. „Kisz Esperanto Kursrondo“, **Sajobabony**, Lakotelep. Kisz. otthon, Borsod m.

GDR. Rudi Süp, Karl-Marx-Stadt W 33, Wilh. Walffstr. 13, dez. kor. kun ĉiuj landoj pri div. temoj.

Bulgario. K-do Ivan Kovaĉev, asistanto en Supera Agrikultura Instituto „V. Kolarov“, katedro Botaniko. **Plovdiv**, dez. koresp. en Esperanto, itala kaj rusa ling-voj kun ĉiuj iandoj pri botanikaj temoj kaj interŝanĝi koncernajn librojn.

Ĉeĥoslovakio. 15 komencantoj dez. koresp. tutmonde, precipe per il. p. k. Skribu al **Miloŝ Chlouba**, Dra Valiŝe 15, **Kuřim u Brna**.

Bulgario. Fraŭlino Emilija Ĵocova — medicina laboristino en kontraŭepidemia stacio — dez. koresp. kaj interŝ. bildkartoĵn kaj leterojn tutmonde. Mi certe respondos. Str. „Bonas Ĉonos“ N-ro 13, urbo **Vidin**.

GDR. 70-jarulo serĉas korespondadon kaj interŝanĝadon de p. k. ilustritaj kaj fotografaĵoj kun Bulgario, Hungario kaj landoj aziaj. **Th. Löttsch**, A. Bebel-Str. 18, i, **Frohburg i. Sa.**, (Kr. Geithai), DDR.

Sovetio. Korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartoĵn ilustritajn kun ĉiuj landoj deziras K-do **Teodoro Ljaŝeviĉ**, postrestante p/o Siverskaja, **Gatĉ. r. Len. obl.**, SSSR.

Ĉeĥoslovakio. K-do **Jiří Krajíc**, Spojovaci ĉ. 8, **Plzeň**, dez. kor. per il. poŝtkartoĵ. Interŝanĝas p.-m. kaj il. revuojn nacilingvajn kun ĉiuj landoj.

Sovetio. A. P. Tomilov, USSR, Baku 69, pr. Lenina 132, kv. 22, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, il. p. k. kun ĉiuj landoj. Certe respondos.

Mi tre dez. kor. k. interŝ. librojn kun francaj esperantistoj. Mia adreso: UZSSR, **Taŝkent, 6**, Poŝtrestante. **K. F. Afanasjev**.

Inĝeniero (36-j.) dez. koresp. k. interŝ. poŝtm. kun ĉ. 1. **Balter S. C.**, str. Kotovski, 62, Kisinev, Moldavia, SSSR.

Canko Murgin, str. Iskar, **Sofio**, Bulgario; universitata lektoro pri ekonomia geografio, deziras korespondi kun samfakuloj, interŝanĝas publikigendajn artikolojn, interesiĝas pri reciprokaj gastigoj kaj havigas unuataĝan koverton (15. 12. 1956) de la lasta (tria) bulgara esperanto-poŝtmarko (pr. 5 i. r. k.).

Sveda MEM-sekcio aperigos tre baldaŭ en kvara kompletigita eldono la poemaron „KANTOJ POR LA PACO“ de **Canko Murgin**. Gi enhavas 47 poemojn (36 orginaloj) kaj 11 tradukojn. La prezo de unuopa ekzemplero estas 4 i. r. k. aŭ egalvaloro en nacia valuto (ekz. 1,6 sv. kr. aŭ 2 anglaj ŝilingoj). Esp.-kluboj kaj revendistoj kiuj mendos antaŭ 20-a de Junio 1960 minimume 50 ekzemplerojn ricevos la stokon ĝis la fino de la sama monato kaj ĝuos 40 %-an rabaton. En tia okazo 50 ekz. kostos nur 120 i. r. k. aŭ 48 sv. kr. aŭ £ 3 aŭ 9 us. dol. ktp. La mendojn antaŭpagu al: **Karl Kvist**,

Box 109 A, Deje, Svedio.

Ĉeĥoslovakio. MUD-ro Oldřich Pospíšil, Nové Město nad Metují, dez. kor. pri medicino, spec. ginekologio kaj pri popolaj kuracmetodoj en diversaj landoj.

Filatelilaj raraĵoj

PACVIRINOJ SUR HUNGARAJ POŝTMARKOJ

Okaze de la Internacia Tago de Virinoj la hungara poŝto eldonis du seriojn da poŝtmarkoj je 60 *fileroj*. Sur la unu troviĝas la bildo de la konata germana batalantino Klara Zetkin kaj sur la alia tiu de la hungara martirino Kató Hámán. Ŝi estis ankaŭ fervora esperantistino. Ŝia statuto staras ĉe la Okcidenta Stacidomo en Budapeŝt. Ŝian nomon portas diversaj institucioj, lernejoj, pionirhejmoj.

Certe ŝi estas la unua esperantistino, kies portreto vidiĝas sur poŝtmarko.

LA ESPERANTO-KOMITATO DE LA HUNGARA PASKONSILANTARO

havis kunsidon okaze de la dekjara datreveno de la Stokholma Pacmesaĝo. Gimn. direktoro **L. Domokos,** prez. de la komitato, faris paroladon pri la Stokholma alvoko. Kaj knabinoj prezentis pacpoemojn. La kunsido decidis denove eldoni numeron de PACO en Hungarlando.

P. B.

Novaperinta libro:

OUANG LOI SUDE DE LA 17-a PARALELO

(Kun antaŭparolo de D-ro Le Dinh Tham Prezidanto de la Vjetnama Packomitato)

Tradukis NGUYEN MINH KINH kaj eldonis FREMDLINGVA ELDONEJO, HANOJO.

Ĉiu kontraŭfaŝisto devas ĝin legi kaj diskonigi; estas honesta kaj objektiva libro pri abomenaj faktoj, kiujn oni ne lasu el la memoro.

Mendu ĉiujn vietnamajn esperantoeldonaĵojn ĉe la libroservo So Xuat Nhap Kjau Sach Bao, 32, Hai Ba Trung, Hanoi, Vietnamio.

Peranto por Sovetio estas K-do G. Kudrjavickij, st-Tchekova, n-ro 25, kb. 1, Moskvo K-6.

Borsod-Abauy-Zemplén, Hungario, tre bela faldprospekto kun bildoj kaj kun hungara landkarto, montrante, kie estas E-grupoj kaj delegitoj. Vere laŭdinde. Eldonis Turisma Oficejo, Miskolc, Szĉhenyi u. 40.

E1 Ilheus Bahia, Brazilo,

raportas la MEM-peranto Eléus Leonardo de Sá, ke post la realigo de la XVI-a Kongreso Brazila de Esperanto kreskis la intereso por Esperanto kaj ke multaj personoj volas ĝin lerni. Laŭ la intereso montrita de la lernantoj-komencantoj estas antaŭvidata granda sukceso por Esperanto en Ilheus. Instruanto estas Eleus Leonardo de Sa.

La adreso de la kurso: Rua Carneira da Rocha, 275, Ilheus Bahia, Brazilo.

La adreso de la instruisto: Caixa postal 72, Ilheus Bahia, Brazilo.

Atentigo

Karaj gek-doj! Ĉar mi ne plu havas funkcion en la ĉeĥoslovaka MEM-sekcio kaj tial ne enspezas la jara-bonojn por „Paco“ en ĈSR, el kiuj mi povis pagi la afrankojn por korespondado kun MEM-anoj kaj abonantoj, mi povas nun nur respondi viajn leterojn private, se vi aldonas int. resp. kuponon aŭ ĉsl. p. m. por la afranko.

Rudolf BURDA, poŝt. pr. 43, Plzeň I, Ĉeĥoslovakio.

M. E. M. — sekretariejo

Prezidento: Canko **Murgin**, str. Iskar 46, **Sofia**, Bulgario. Ĉefsekretario: A. **Balague**, Traiseng. 26, **St. Pölten**, Aŭstrio.

Centra redaktoro: G. **Holmkvist**, Ronneholmsvagen 55, tr. 2, IV, **Malmö V**, Svedio.

La Paco aperadas ĉiumonate en alia lando.

Tiu ĉi duobla numero estas eldonita de la MEM-sekcio ĉe Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato (Osvětový ústav, Praha 12, Blanická 4).

Redaktoro: Jos. Ed. **Ambrož**, Brno-Židenice, Špačkova 3.

Administracio: Esperantista rondo de Závodní klub ROH Zavodů V. I. Lenina, Plzeň, Kopeckého sady 13.

Jarkotizo: 20 Kčs — Presis:

Okcidentbohema presejo, nacia entrepreno en PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio.